# RUSIA REVOLUCIO DE 1917




AL ĈIUJ!...
AL ĈIUJ!...
AL ĈIUJ!...
SOCIALISMA CIVILIZO...
NASKIĜJARO—
1917...


LA KREO DE LA UNUA EN LA MONDO SOCIALISMA ŜTATO MALFERMIS AL LA POPOLOJ DE LA TERO LA VOJON POR KONSTRUADO DE LA NOVA, VERE DEMOKRATIA SOCIO.
NENIU REVOLUCIO OKAZIS! SIMPLE LENIN VENĜIS AL LA CARO PRO SIA MORTEKZEKUTITA FRATO!..
...PEREIS RUSIO! LA BOLŜEVIKOJ INUNDIS ĜIN PER SANGO!..




LA GRANDA OKTOBRA SOCIALISMA REVOLUCIO SAVIS RUSION DE EKONOMIA KAJ NACIA KATASTROFO.
SE VI EKVOLOS TRALEGI TUTAN LITERATURON PRI LA RUSIA REVOLUCIO DE 1917, POR VI NE SUFIĈOS LA TUTA VIVO. PRI LA REVOLUCIO ESTAS VERKITAJ CENTOJ DA LIBROJ, PRI ĜI SKRIBIS KAJ ĜIAJ AMIKOJ, KAJ ĜIAJ MALAMIKOJ.
KIO DO OKAZIS EN RUSIO EN 1917?
...PIKANTA DETALO. EN 1917 SOVETOJ KOMENCIS PER NACIIGO DE VIRINOJ!..




ELDONEJO "PROGRESO". MOSKVO

Авторы текста: Добровольская Е., Макаров Ю.
Русская революция 1917: как это было?
*На языке эсперанто*

Художник Васильев А.
Шрифт Поляков Л.

Редактор русского текста Затолокина В.
Художественный редактор Ефремов А.
Контрольный редактор Шевченко А.
Tradukis el la rusa Elena Ŝevĉenko, Ludmila Novikova
Dobrovolskaja E., Makarov Ju. Rusia revolucio de 1917: kiel tio okazis?
Grafiko de Leonid Poljakov

ИБ № 17891

©Eldonejo "Progreso", 1990
Esperanta traduko ©Eldonejo "Progreso", 1990
Presita en Soveta Unio




P $\frac{0505030100-010}{014(01)-90}$ 315–90

ISBN 5–01–002340–7

KROM LA EKSTERORDINARA
AKCELIĜO DE LA TUTMONDA
HISTORIO, ESTIS NECESAJ ĜIAJ
SPECIALE ABRUPTAJ TURNOJ,
POR KE ĈE UNU EL TIAJ TURNOJ
LA ĈARO DE LA KOVRITA PER
SANGO KAJ KOTO MONARKIO DE
ROMANOV POVU RENVERSIĜI TUJE.

V.I.LENIN




NOKTE DE LA 2-A AL LA 3-A DE MARTO 1917 LA LASTA RUSIA IMPERIESTRO NIKOLAO LA DUA, REGINTA LA LANDON 23 JAROJN, ABDIKIS LA TRONON...
LA ABRUPTA TURNO DE LA HISTORIO, ĈE KIU RENVERSIĜIS LA ĈARO DE LA RUSIA AŬTOKRATIO, ESTIS LA UNUA MONDMILITO.
DUM LA UNUA MONDMILITO TUTAJ REGIONOJ DE EŬROPO, INKLUZIVE ANKAŬ OKCIDENTAN RUSION, ESTIS DEZERTIGITAJ.
9,5 MILIONOJ DA HOMOJ ESTIS MORTIGITAJ KAJ MORTIS PRO VUNDOJ
20 MILIONOJ ESTIS VUNDITAJ
3,5 MILIONOJ POR ĈIAM RESTIS KRIPLAJ




PRO KIO DO KOMENCIĜIS TIU MONDA BUĈADO?
IU SERBA GIMNAZIANO EN SARAJEVO MORTPAFIS AŬSTRI-HUNGARIAN ĈEFDUKON, KAJ DO KOMENCIĜIS...
ĈU NI ĈIUJ MILITAS PRO IU ĈEFDUKO? TIO MALEBLAS!


EN HISTORIO RESTIS MULTAJ ATESTOJ KAJ OPINIOJ PRI LA MORTIGO EN SARAJEVO. ESTIS ANKAŬ TIAJ...
VERŜAJNE, ONI LA ĈEFDUKON PER ORA PISTOLO MORTPAFIS!
PLAGO ESTAS TIUJ "SCIENCULOJ"! PER LA UNUA PAFO MORTIGIS!
BEDAŬRINDE, KE MIA PISTOLO NE PAFAS!



MORTIGO DE LA HEREDANTO DE LA AŬSTRI-HUNGARIA TRONO ĈEFDUKO FRANC FERDINAND LA 15-AN (28-AN) DE JUNIO 1914 EN SARAJEVO ESTIS NUR PRETEKSTO POR LA UNUA MONDMILITO.
PRETEKSTO
POR KE EKBRULU LA FLAMO DE LA MONDA INCENDIO, ESTIS BEZONATA NUR ALUMETO. ĜI TRAFIS EN LA MANOJN DE SERBA GIMNAZIANO.
LA KAŬZO DE LA MILITO ESTIS STREBO DE LA EVOLUINTAJ KAPITALISMAJ ŜTATOJ AL REDIVIDO DE LA MONDO.


ĈU PRO IU GIMNAZIANO NI DEVAS SANGON VERŜI?
NE LI ESTAS KIALO! JA KAPITALISTOJ VOLAS PROFITI PER LA MILITO!
REKRUTEJO
AL LA FRONTO



GERMANIA KOALICIO
GERMANIO
AŬSTRI-HUNGARIO
TURKIO
ILI RAPIDAS REDIVIDI LA MONDON SIAMANIERE.




ENTENTO
BRITIO
FRANCIO
RUSIO
MILITO, SAMKIEL AJNA
HISTORIA EVENTO,
SIMILAS GLACIMONTON.
EKSTERE ESTAS NUR PRETEKSTOJ,
LA INTERNA ESENCO ESTAS KAŜITA.
VERA KAJ BAZA KAŬZO DE LA UNUA
MONDMILITO ESTAS KONTRAŬECOJ INTER
LA GERMANIA KAJ BRITIA
KAPITALOJ.


ANTAŬ KOMENCO DE LA MILITO REKRUTIĜIS:
ENTENTO – 10 MILIONOJN 119 MIL PERSONOJN:
RUSIO – 5 MILIONOJN 338 MIL,
BRITIO – 1 MILIONON,
FRANCIO – 3 MILIONOJN 781 MIL.
GERMANIA KOALICIO – 7 MILIONOJN 922 MIL PERSONOJN:
GERMANIO – 3 MILIONOJN 822 MIL,
AŬSTRI-HUNGARIO – 2 MILIONOJN 300 MIL,
TURKIO – 1 MILIONON 800 MIL.
MIAJ ENSPEZOJ KRESKIS SESOBLE!
KAJ LA MIAJ – KVINOBLE!
MI ANKORAŬ NE KALKULIS!
GERMANIO
FRANCIO
BRITIO
EN LA MILITON ESTIS ENGAĜITAJ 38 ŜTATOJ KUN LOĜANTARO 1,5 MILIARDOJ DA PERSONOJ. DEKOJ DA MILIONOJ DA SOLDATOJ DE AMBAŬ FLANKOJ MORTIGADIS UNU LA ALIAN. USONO ALIĜIS LA MILITON MALPLI FRUE OL ALIAJ LANDOJ, KUN MALMULTAJ MILITFORTOJ, SED RICEVADIS LA PLEJ GRANDAJN PROFITOJN.





KIU DO VENKOS EN TIU MILITO?
NI PERSONE AMBAŬ MALVENKOS!
KAJ GAJNOS PRO LA MILITO NUR TIUJ, KIUJ RICEVADAS PROFITON, SENDEPENDE DE TIO, ĈU VENKIS AŬ MALVENKIS EN LA MILITO ILIA LANDO.
HEJ, BRAVULOJ, PLI VIGLE TURNU! KUN MI JA LA AFERO PLIVIGLIĜIS. KAJ MIAJ ENSPEZOJ KRESKIS JAM DEKOBLE!
GERMANIO
USONO
FRANCIO
BRITIO



2–670


KIAL LA REVOLUCIO OKAZIS ĜUSTE EN RUSIO?..
AL LA KOMENCO DE LA 20-A JARCENTO RUSIO IĜIS CENTRO DE LA MONDA REVOLUCIA MOVADO. KUNE KUN TIO, ĜI ESTIS LA PLEJ MALFORTA ERO EN LA ĈENO DE LA EVOLUINTAJ KAPITALISMAJ ŜTATOJ. ĜUSTE EN RUSIO PLEJ AKRE MANIFESTIĜIS SOCIAJ KAJ ALIAJ ANTAGONISMOJ, KREIĜIS KAJ FORMIĜIS TIU REVOLUCIA SITUACIO, KIAM...
EN 1911 EN RUSIO STRIKIS 105 MIL LABORISTOJ
EN 1912 – PLI OL MILIONO DA LABORISTOJ
NUR EN LA UNUA DUONJARO DE 1914 – 1 MILIONO 337 MIL LABORISTOJ
NUR EN LA UNUA MONATO DE 1917 – 270 MIL LABORISTOJ
KRESKIS KAJ FORTIKIĜIS EN RUSIO LA NOVA REVOLUCIA FORTO – PROLETARO.
LA MALSUPRULOJ NE VOLAS VIVI MALNOVMANIERE.





NI REĜAS SUPER VI
NI REGAS VIN
NI PREĜAS JE VI
NI PAFAS KONTRAŬ VIN
NI MANĜAS ANSTATAŬ VI
NI LABORAS POR VI
NI NUTRAS VIN
LABORISTOJ, KAMPARA MALRIĈULARO, MEZRIĈAJ KAMPARANOJ KONSISTIGIS KVAR KVINONOJN DE LA LOĜANTARO DE RUSIO


LA SUPERULOJ NE POVAS...
NUN MIA KRONO ESTAS POR MI ĜUSTE KONVENA!
UNU CERBO BONAS, KAJ TRI-PLI BONAS!
RASPUTIN GRIGORIJ JEFIMOVIĈ (NASKIĜIS EN 1872).
KAMPARANO-PROFETO EL TOBOLSKA GUBERNIO. KIEL "AŬGURISTO" KAJ "SANIGANTO" LI AKIRIS NELIMIGITAN INFLUON AL LA CARO, CARINO, ILIA ĈIRKAŬANTARO.
LI OFTE ENMIKSIĜIS EN LA ŜTATAJN AFEROJN.
EN 1916 ESTIS MORTIGITA FAR LA MONARKISTOJ, KIUJ VIDIS EN LI LA KAŬZON DE ĈIUJ PLAGOJ DE RUSIA ŜTATO.




GRIGORIJ JEFIMOVIĈ, LA CARIDO DENOVE EKMALSANIS. BONVOLU KURACI, MI PETAS...
JON AJN MI FARU POR LA PAĈJETO KUN CARINETO!
NE RIFUZU PRI KONSILO, BONFARANTO NIA!
IRU, NI JON PRIPENSOS!
NI VIN LA TUTAN VIVON NE FORGESOS, KARA NIA!
STATKASO
NU, NE GRAVAS! LA DIO INDULGOS!


...NE POVAS REGI MALNOVMANIERE.
LA ŜIPO DE LA RUSIA AŬTOKRATIO NAVIGIS LAŬ ONDOJ DE KONTRAŬECOJ AL SIA LASTA HAVENO.
KIA ĈARMA SUNSUBIRO!
DUM 30 MONATOJ (EKDE AŬGUSTO 1914 ĜIS FEBRUARO 1917) EN RUSIO ŜANĜIĜIS 4 PREZIDANTOJ DE KONSILIO DE MINISTROJ, 6 MINISTROJ PRI INTERNAJ AFEROJ, 4 ARMEAJ MINISTROJ.
AŬGUSTO 1914
FEBRUARO 1917
SUBIRO DE LA RUSIA AŬTOKRATIO.
MILITAJ ELSPEZOJ KRESKAS
INFLACIO
DEPENDECO DE EKSTERLANDA KAPITALO
RUINIĜO DE ADMINISTRA APARATO
ŜAJNE, LA PASAĜEROJ NE KOMPRENAS, KE LA ŜIPO TRAFIS AKCIDENTON.
SED NI JA SCIAS PRI SENESPERECO DE LA AŬTOKRATIO. KAJ NI NE TRE MALMULTAS!
OPOZICIO



LA PLEJ GRANDAJ KAJ INFLUAJ BURĜAJ PARTIOJ DE RUSIO.
SOCIALISTOJ-REVOLUCIULOJ (ESEROJ). GRANDA ETBURĜA PARTIO EN RUSIO, ESPRIMIS INTERESOJN DE LA URBA KAJ KAMPULARA ETBURĜARO.
LABORA GRUPO (LABORGRUPANOJ), ESPRIMIS INTERESOJN DE LA RUSIA KAMPULARA BURĜARO.
KONSTITUCI-DEMOKRATIA PARTIO. BAZA PARTIO DE LA LIBERALE-MONARKISTA BURĜARO.
"PROGRESISTA" PARTIO (PROGRESISTOJ) NACIIST-LIBERALA PARTIO DE GRANDBURĜARO.
MONARKIO PLUS PARLAMENTO!
VIVU AGRARA REFORMO!
POR PROSPERO DE GRANDA KAPITALO, FORTIĜO DE MONOPOLOJ!
NI UNUIĜU EN KOOPERATIVOJN!
KONSTITUCI-DEMOKRATOJ
ESEROJ
PROGRESISTOJ
LABORGRUPANOJ
KIA UTILO ESTAS DE NIA OPOZICIO! ŜAJNAS, LA CARO AL ĜI TUTE NE MALHELPAS!
MI NE VIDAS EN RUSIO TIAN PARTION, KIU KAPABLUS FARI REVOLUCIAN RENVERSON!






EN 1895 LENIN KREIS "UNION DE BATALO POR LIBERIGO DE LA LABORISTA KLASO!" POST TRI JAROJ ESTIS KREITA RUSIA SOCIAL-DEMOKRATIA LABORISTA PARTIO (RSDLP), DONINTA AL LA MONDO LA BOLŜEVIKOJN.
...EN LA AFERO DE BATALO KONTRAŬ LA AŬTOKRATIO, BATALO KONTRAŬ LA BURĜARO DE LA TUTA RUSIO NI DEVAS AGI KIEL UNUECA, CENTRIGITA, BATALA ORGANIZO, NI DEVAS APOGI NIN SUR LA TUTA PROLETARO, SEN DIFERENCIGO LAŬ LINGVO KAJ NACIECO...
EKZISTAS TIA PARTIO!

**BOLŜEVIKOJ...** PRI ĈIUJ AJN PEKOJ KULPIGIS ILIN MALAMIKOJ DE LA KOMUNISMO DIVERSTEMPE.







## KION SIGNIFAS LA VORTO "BOLŜEVIKO"?

LA NOCIO "BOLŜEVISMO" APERIS EN 1903 LIGE KUN LA ELEKTADO DE LA PARTIAJ GVIDORGANOJ EN LA 2-A KONGRESO DE RSDLP, KIAM LA SAMIDEANOJ DE LENIN KONSISTIGIS PLIMULTON (BOLŜEVIKOJ), KAJ LA OPORTUNISTOJ – MALPLIMULTON (MENŜEVIKOJ).


## KIES INTERESOJN REPREZENTIS LA BOLŜEVIKOJ?


LA BOLŜEVIKOJ REPREZENTIS INTERESOJN DE LA PROLETARO KAJ MALRIĈA KAMPULARO.




ANTAŬ KOMENCO DE LA MILITO REKRUTIĜIS:
ENTENTO – 10 MILIONOJN 119 MIL PERSONOJN:
RUSIO – 5 MILIONOJN 338 MIL,
BRITIO – 1 MILIONON,
FRANCIO – 3 MILIONOJN 781 MIL.
GERMANIA KOALICIO – 7 MILIONOJN 922 MIL PERSONOJN:
GERMANIO – 3 MILIONOJN 822 MIL,
AŬSTRI-HUNGARIO – 2 MILIONOJN 300 MIL,
TURKIO – 1 MILIONON 800 MIL.
MIAJ ENSPEZOJ KRESKIS SESOBLE!
KAJ LA MIAJ – KVINOBLE!
MI ANKORAŬ NE KALKULIS!
GERMANIO
FRANCIO
BRITIO
EN LA MILITON ESTIS ENGAĜITAJ 38 ŜTATOJ KUN LOĜANTARO 1,5 MILIARDOJ DA PERSONOJ. DEKOJ DA MILIONOJ DA SOLDATOJ DE AMBAŬ FLANKOJ MORTIGADIS UNU LA ALIAN. USONO ALIĜIS LA MILITON MALPLI FRUE OL ALIAJ LANDOJ, KUN MALMULTAJ MILITFORTOJ, SED RICEVADIS LA PLEJ GRANDAJN PROFITOJN.




KIU DO VENKOS EN TIU MILITO?
NI PERSONE AMBAŬ MALVENKOS!
KAJ GAJNOS PRO LA MILITO NUR TIUJ, KIUJ RICEVADAS PROFITON, SENDEPENDE DE TIO, ĈU VENKIS AŬ MALVENKIS EN LA MILITO ILIA LANDO.
HEJ, BRAVULOJ, PLI VIGLE TURNU! KUN MI JA LA AFERO PLIVIGLIĜIS. KAJ MIAJ ENSPEZOJ KRESKIS JAM DEKOBLE!
GERMANIO
USONO
FRANCIO
BRITIO


LA 10-AN DE FEBRUARO KOMENCIĜIS LABORISTAJ MANIFESTACIOJ EN PETROGRADO.
LA 14-AN DE FEBRUARO ĈESIGIS LABORON JAM 90.000 LABORISTOJ DE 58 ENTREPRENOJ.
LA 23-AN DE FEBRUARO (LAŬ LA JULIA KALENDARO) ONI FESTIS LA INTERNACIAN VIRINAN TAGON.
MILOJ DA PETROGRADAJ VIRINOJ ELIRIS EN TIU TAGO SUR AVENUON NEVSKIJ KUN LA SLOGANOJ "PANON!", "ĈESIGU LA MILITON!", "BALOTRAJTOJN-AL LA VIRINOJ!".
PANON!
ĈESIGU LA MILITON!




VIA EDZO PEREIS EN LA FRONTO
VIA EDZO PEREIS EN LA FRONTO
VIA EDZO PEREIS EN LA FRONTO
PANO MANKAS!
TORTO FESTAN GRATULON!
BALOTRAJTO
JEN KIAJN DONACOJN RICEVIS RUSAJ VIRINOJ TIUN TAGON!
128 MIL LABORISTOJ STRIKIS, SUBTENANTE LA VIRINAN MANIFESTACION. LA REVOLUCIAN INICIATON DE LA AMASOJ SUBTENIS LA BOLŜEVIKOJ. EN LA ŜTORME KRESKANTAN MOVADON ILI ENPORTIS KONSCIECON KAJ ORGANIZITECON.
BALOTRAJTOJN— AL LA VIRINOJ!
ĈESIGU LA MILITON!
PANON!
TIU TAGO IĜIS KOMENCO DE LA FEBRUARA REVOLUCIO.


LA 24-AN DE FEBRUARO LA NOMBRO DE STRIKANTOJ KRESKIS ĜIS 214 MIL PERSONOJ.
LA 25-AN DE FEBRUARO KOMENCIĜIS LA ĜENERALA POLITIKA STRIKO, PARALIZINTA LA EKONOMIAN VIVON DE LA URBO...
VESPERE LA 25-AN DE FEBRUARO LA KOMANDANTO DE LA ĈEFURBA ARMEA DISTRIKTO GENERALO ĤABALOV RICEVIS ORDONON DE LA CARO PRI NEPROKRASTEBLA ĈESIGO DE MALORDO EN LA ĈEFURBO.
MI ORDONAS MORGAŬ NEPRE ĈESIGI EN LA ĈEFURBO MALORDON, NEALLASEBLAN DUM LA MALFACILA MILITA TEMPO.
MI PUBLIKIGIS LA DEKLARON, MALPERMESANTAN AMASIĜON.




LA 26-AN DE FEBRUARO EN PLURAJ REGIONOJ DE LA URBO OKAZIS SANGAJ INTERPUŜIĜOJ DE LA LABORISTOJ KUN LA POLICO KAJ ARMETRUPOJ.
ĈE KIES FLANKO ESTAS LA VIRINOJ, TIE ESTOS ANKAŬ LA VENKO!
KIAL DO VIRINOJ? GRAVAS, KIUN FLANKON TENAS LA ARMEO!

3–670









VESPERE LA 27-AN DE FEBRUARO LABORISTOJ KAJ SOLDATOJ ELEKTIS SIAJN DEPUTITOJN EN LA PETROGRADAN SOVETON.
LA PLENA SUBTENO DE LA POPOLO DONIS AL ILI TUTECON DE LA POTENCO. SED EN LA SOVETO DAŬRIS LA BATALO INTER LA BOLŜEVIKOJ KAJ REPREZENTANTOJ DE LA ETBURĜAJ PARTIOJ.
KIU DO SUPEROS?

**SOVETOJ** ESTAS ELEKTATAJ POLITIKAJ ORGANIZOJ DE LA LABORISTOJ, SOLDATOJ, KAMPARANOJ, UNUAFOJE APERINTAJ EN RUSIO DUM LA UNUA RUSIA REVOLUCIO DE 1905-1907





LA ONDON DE LA POPOLA REVOLUCIO UZIS LA BURĜARO. DUM LA LABORISTOJ KAJ SOLDATOJ BATALIS POR LA POTENCO SUR LA STRATOJ DE PETROGRADO, LA BURĜOJ, KIUJ ANTAŬE KUNSIDIS EN LA CARA ŜTATA KONSILANTARO, NOKTE LA 28-AN DE FEBRUARO DEKLARIS SIN PROVIZORA KOMITATO DE LA ŜTATA KONSILANTARO.


LA 2-AN DE MARTO REPREZENTANTOJ DE LA PROVIZORA KOMITATO DE LA ŜTATA KONSILANTARO VENIS TRAKTI AL LA CARO KAJ POSTULIS DE LI ABDIKI LA TRONON.
LA CARO KAJ MINISTROJ
POR KIO MI BEZONAS TIUN ŜARĜON?!
KION NI FARU, VIA MOŜTO?
EBLE, VI ABDIKU FAVORE AL LA HEREDANTO?
NE, MI ABDIKAS MEM KAJ ANSTATAŬ LA FILO, FAVORE AL LA FRATO.
LA CARO ABDIKIS, LA GRANDA PRINCO ABDIKIS!
POVRA RUSIO! NENIU VOLAS ĜIN REGI!





SED LA DEZIRANTOJ REGI TROVIĜIS TUJ!
CARA ŜTATA KONSILANTARO
PROVIZORA KOMITATO DE LA ŜTATA KONSILANTARO
PROVIZORA REGISTARO
LA SAMAN TAGON LA BURĜARO FORMIS LA PROVIZORAN REGISTARON DE RUSIO.


ĈIAM KUN LA POPOLO DE PATRIO!
LIBERO KAJ DEMOKRATIO!
EGALECO KAJ FRATECO!
HURA AL NIA REVOLUCIO!
CIVITANO GUĈKOV ARMEA KAJ MARARMEA MINISTRO
GRANDKAPITALISTO, KIU SALUTIS FRAKASON DE LA RUSA REVOLUCIO DE 1905-1907.
CIVITANO LVOV ĈEFO DE LA REGISTARO
GRANDBIENULO, ADEPTO DE LA "REZOLUTAJ RIMEDOJ" EN LA BATALO KONTRAŬ LA REVOLUCIA MOVADO.
CIVITANO KONOVALOV MINISTRO PRI KOMERCO KAJ INDUSTRIO
GRANDA TEKSFABRIKISTO, KIU PROKLAMIS LA POLITIKON DE "FERA PUGNO" EN RILATOJ KUN LA LABORISTOJ.
CIVITANO TEREŜĈENKO MINISTRO PRI FINANCOJ
GRANDA TERPOSEDANTO KAJ POSEDANTO DE SUKERUZINO, ADEPTO "DE MILITO ĜIS VENKOFINO."
LA UNUA KABINETO DE LA PROVIZORA REGISTARO
KIU DO PRENIS LA POTENCON EN RUSIO? DE UNU FLANKO – BURĜAJ DEMOKRATOJ. KAJ DE LA ALIA...


MARTE DE 1917 EN RUSIO KREIĜIS ORIGINALA KAJ EKSTREME KONTRAŬECA INTERPLEKTIĜO DE DU POTENCOJ: LA POTENCO DE BURĜARO KAJ LA REVOLUCI-DEMOKRATIA POTENCO DE LA PROLETARO KAJ KAMPULARO.
PROVIZORA REGISTARO — UNUE. PETROGRADA SOVETO — DUE.
DU POTENCOJ EN UNU LANDO. ĈU NE TRO?
LAŬ LA ORDONO NUMERO UNU DE LA PETROGRADA SOVETO HODIAŬ NI ELEKTAS ARMEAN KOMITATON.
ĈU LA GENERALO PERMESIS?
NECESAS NENIES PERMESO. NIA KOMITATO KONTROLOS ORDONOJN DE LA GENERALO KAJ ĈIUJ OFICIROJ.




CEDINTE LA POTENCON AL LA BURĜA PROVIZORA REGISTARO PRO LA KULPO DE SIAJ MENŜEVIKAJ GVIDANTOJ, LA PETROGRADA SOVETO, DANK'AL SUBTENO DE LA LOĜANTARO, TAMEN HAVIS TUTE REALAN FORTON.
ĈESU LA LABORON! LA SOVETO KONFIRMIS 8-HORAN LABORTAGON!
ĈU ONI NE MONPUNOS?!
LA MONPUNOJ ESTAS ABOLITAJ!
SOCIAN ESENCON DE LA KREIĜINTA DUPOTENCO LENIN VIDIS EN NESUFIĈA POLITIKA MATURECO KAJ ORGANIZITECO DE LA PROLETARO, KAJ ANKAŬ EN SENPRECEDENCA AKTIVECO DE ETBURĜAJ TAVOLOJ DE LA LOĜANTARO.


MULTNOMBRAJ MITINGOJ KAJ KUNVENOJ EN TIUJ TAGOJ JAM NE MIRIGIS LA PETROGRADANOJN. SED TIU MITINGO ESTIS DESTINITA ENIRI LA HISTORION.
LA 3-AN DE APRILO 1917 MILOJ DA PETROGRADANOJ RENKONTIS REVENINTAN POST EMIGRADO LENIN. LIAJN VORTOJN EKAŬDIS NE NUR KOLEKTIĜINTOJ SUR LA PLACO. LIAJN VORTOJN EKAŬDIS LA TUTA RUSIO.
LA MILITO ANKAŬ KUN LA PROVIZORA REGISTARO RESTAS IMPERIISMA...
...NENIUN SUBTENON AL LA PROVIZORA REGISTARO!...
...VIVU SOCIALISMA REVOLUCIO!...
KIAL DO LA MITINGO ESTAS ĈE STACIDOMO? ĈU IU FORVETURAS?
NE. ONIDIRE, LA ĈEFA BOLŜEVIKO REVENIS DEEKSTERLANDE. IO DO OKAZOS?!




JES, SINJOROJ ALIANCANOJ, NI PRETAS DAŬRIGI LA MILITON ĜIS VENKA FINO!
NI NE VOLAS MILITI!
INTERESE, KIU DO PRETAS MILITI?
LA PROVIZORA REGISTARO, KIU ANKORAŬ?
DO ĜI MEM MILITU.


LA PROVIZORA REGISTARO NE SOLVIS KAJ NE POVIS SOLVI EĈ UNU EL LA ĈEFAJ DEMANDOJ DE LA REVOLUCIO: DEMANDOJN PRI LA MILITO KAJ PACO, LA AGRARAN, LA LABORISTAN, DE LA BATALO KONTRAŬ RUINIĜO, MALSATO, LA ETNAN. ĈIUJ BELAJ PROMESOJ KREVIS KIEL SAPVEZIKOJ.
PROVIZORA REGISTARO
PANO!
PACO!
LIBERO!
FOR LA MINISTROJN-KAPITALISTOJN!
PANON, PACON, LIBERON!




LA POLITIKA KALENDARO DE LA TIUMONATA RUSIO ESTIS MARKITA PER PERMANENTAJ KRIZOJ. EL LA PROVIZORA REGISTARO, ŜANĜANTA SIAJN KONSISTOJN SUB PREMO DE LA POPOLAMASOJ, SED ĈIAM REPREZENTANTA "GRANDAJN MONUJOJN," ELFALIS GVIDANTOJ, KIUJ TUJ ESTIS ANSTATAŬIGATAJ DE LA ALIAJ.
ESTAS MORTIGITAJ 56 PERSONOJ
ESTAS VUNDITAJ 650 PERSONOJ
NE, TIO NE ESTAS CARA EPOKO, ESTAS LA 4-A DE JULIO 1917. LA TRUPOJ DE LA PROVIZORA REGISTARO EKPAFADIS KONTRAŬ LA 500-MILOPAN PACAN MANIFESTACION. ILI VOLIS SAVI LA REVOLUCION... DE LA PROPRA POPOLO!
POST LA SANGAJ JULIAJ EVENTOJ LENIN SKRIBIS: "LA KONTRAŬREVOLUCIO ORGANIZIĜIS, FIRMIĜIS KAJ FAKTE PRENIS LA ŜTATPOTENCON EN SIAJN MANOJN."
LA DUPOTENCO FINIĜIS...




PRO KIO ONI MORTIGIS LA LABORISTON VOINOV?
LI VENDADIS LA BOLŜEVIKAN ĴURNALON "LISTOK PRAVDI."
10
ЧАСЫ
VENIS LA TEMPO DE REAKCIO.
ENDAS URĜE ARESTI LENIN.
LA BOLŜEVIKA PARTIO DEVIS LABORI EKSTERLEĜE. LENIN LASIS PETROGRADON KAJ SIN KAŜIS ĈE LA MALGRANDA STACIO RAZLIV.







MALGRAŬ MURDOJ, ARESTOJ, DETRUADO DE LA TIPOGRAFIOJ, LA BOLŜEVIKA GAZETARO DAŬRE BATALIS.
LA ĴURNALO "PRAVDA" ("VERO", ĈEFA PRESORGANO DE LA PARTIO) APERADIS SUB DIVERSAJ TITOLOJ: "RABOĈIJ I SOLDAT" ("LABORISTO KAJ SOLDATO"), "PROLETARIJ" ("PROLETO"), "RABOĈIJ PUTJ" ("LABORISTA VOJO").
ĈU VI LEGIS LA INFORMON PRI KUNVOKO DE LA KONGRESO DE BOLŜEVIKOJ? INTERESE, KIAL ONI NE SKRIBAS, KIE ĜI OKAZAS?
NUN LA KONGRESO POVAS OKAZI NUR EKSTERLEĜE.
LA 26-AN DE JULIO — 3-AN DE AŬGUSTO EN PETROGRADO OKAZIS LA 6-A KONGRESO DE LA PARTIO DE BOLŜEVIKOJ. ĜI AKCEPTIS KURSON POR PREPARADO DE ARMITA RIBELO, EBLA EN TIU DECIDA MOMENTO, KIAM LA TUTLANDA KRIZO KAJ REVOLUCIA AKTIVIĜO KREOS KONDIĈOJN POR VENKO.


KERENSKIJ-
NOVA PREMIER-MINISTRO DE LA PROVIZORA REGISTARO.
TIU HOMO ŜAJNIGIS SIN ESTI "SAVANTO DE LA RUSIA REVOLUCIO".
KIO KOMUNA ESTAS
ESTUS BONE FARI ARMEAN DIKTATURON. TIO LIGOS MANOJN DE LA BOLŜEVIKOJ!
VIDU, ILI ESTAS TIOM DIVERSAJ KAJ AMBAŬ PRETENDAS LA ROLON DE DIKTATORO DE RUSIO.
NU, KERENSKIJ JA ESTAS JAM PREMIER-MINISTRO. SED KIEN CELAS KORNILOV?




INTER TIUJ HOMOJ?
KORNILOV-
SUPERA ĈEFKOMANDANTO.
TIU HOMO ŜAJNIGIS SIN ESTI "SAVANTO DE LA RUSIA ŜTATO".
ENDAS FARI ARMEAN DIKTATURON KAJ NENIIGI LA BOLŜEVIKOJN!
LA 21-AN – 31-AN DE AŬGUSTO 1917
LA GENERALO KORNILOV DIREKTIS LA ARMETRUPOJN AL PETROGRADO CELANTE ESTABLI ARMEAN DIKTATURON EN RUSIO.
LIA RIBELO ESTIS APOGATA DE LA GRANDBURĜARO KAJ SUBTENATA DE ENTENTO.
LA ORGANIZANTOJ DE LA BATALO KONTRAŬ KORNILOV IĜIS LA BOLŜEVIKOJ. LA RIBELO ESTIS FRAKASITA FAR LA REVOLUCIAJ TRUPOJ.
FRAKASO DE LA RIBELO DE KORNILOV ŜANĜIS LA SITUACION EN LA LANDO.
KONSIDERINDE ALTIĜIS LA AŬTORITATO DE LA BOLŜEVIKOJ, KAJ SAMTEMPE LA AMASOJ KOMPRENIS LA VERAN ESENCON DE LA PROVIZORA REGISTARO.



4-670


PROKSIMIĜIS LA AŬTUNO DE 1917...
PAĈJO, KIEN DE NI FORFLUGAS BIRDOJ?
EN VARMAJN LANDOJN, FILETO. TIEN, KIE ANKORAŬ NE OKAZIS REVOLUCIOJ!
NIA PANPORCIO REDUKTIĜIS SESOBLE DUM 2 SEMAJNOJ. ĜI ESTAS JAM APENAŬ VIDEBLA.
KION VI VIDAS SUR LA MALPLENA MANPLATO?
PANO
ŜI FRENEZIĜIS!
DETRANĈU AL MI EKZAKTE TRIONON DE TIU BOTO.
KIAL DO ŜI? ŜIA MONATA SALAJRO ESTAS 35 RUBLOJ, SED LA BOTOJ KOSTAS 100 RUBLOJN.
ŜUOJ


REVOLUCIO ESTAS MALSANO... LA EKSTERAJ REGNOJ DEVOS INTERVENI, KIEL INTERVENAS LA KURACISTOJ, POR SAVI MALSANAN INFANON...
KAPITALISTO LIANOZOV
TRE SAĜA IDEO: "NI RAPIDU, AMIKOJ, FINI LA REVOLUCION: TIU, KIU FARAS REVOLUCION TRO LONGE, NE UZAS ĜIAJN FRUKTOJN."
KIO NOVA ESTAS EN ĴURNALOJ?
KIO OKAZOS, KIAM VENOS TERURA RUSA VINTRO?
LA VINTRO, SINJORO EKSTERLANDANO, ĈIAM ESTIS AMIKO DE RUSIO. EBLE, ĈI-FOJE ĜI SAVOS NIN DE REVOLUCIO.
POTENCON AL LA SOVETOJ!
PROKSIMIĜIS AŬTUNO, KIES DESTINO ESTIS IĜI PRINTEMPO DE LA RUSIA REVOLUCIO...


**LA HISTORIO NE PARDONOS PROKRASTON AL LA REVOLUCIULOJ, KIUJ POVUS VENKI HODIAŬ (KAJ CERTE VENKOS HODIAŬ), RISKANTE PERDI MULTON MORGAŬ, RISKANTE PERDI ĈION.**

**V.I.LENIN**




KOMENCE DE LA OKTOBRO EN PETROGRADON VENIS LENIN.
PETROGRADO
STR. SERDOBOLSKAJA, DOMO 1/32
ONI DECIDIS LOĜIGI VIN TIE ĈI, EN SEKRETA LOĜEJO.
1. ORGANIZI STABON DE RIBELULAJ TAĈMENTOJ.
2. DISTRIBUI FORTOJN.
3. MOVIGI ĈEFAJN FORTOJN AL LA GRAVAJ OBJEKTOJ: TELEGRAFIA KAJ TELEFONIA CENTRALOJ, FERVOJSTACIOJ.
4. ARESTI ĈEFSTABON KAJ LA PROVIZORAN REGISTARON.
5. GARANTII DECIDAN FRAKASON DE ĈIUJ EBLAJ ARMITAJ AGOJ DE LA KONTRAŬREVOLUCIULOJ.
PLANO DE LENIN PRI ARMITA RIBELO.


EN NIA UZINO ĈIUJ PRETAS POR RIBELO. KIAM NI EKAGOS, KAMARADO?
NI EKAGOS NUR TIAM, KIAM LA PARTIO AKCEPTOS DECIDON PRI LA RIBELO.
KAJO KARPOVSKAJA, DOMO 32/1
LA RIBELO MATURIĜIS KAJ NEEVITEBLAS.
LA PARTIO DEVAS GVIDI ARMITAN RIBELON!
LA 10-AN DE OKTOBRO 1917 EN LA KUNSIDO DE CK RSDLP (B) ESTIS KONFIRMITA LA REZOLUCIO DE LENIN PRI SENPROKRASTA PREPARADO DE ARMITA RIBELO.



REVOLUCIAJ SOLDATOJ DE PETROGRADA GARNIZONO.
TIAJ ESTIS BATALFORTOJ DE LA RIBELO
MARISTOJ DE BALTA MILITŜIPARO
RUĜA GVARDIO.
RUĜA GVARDIO ESTAS ARMITAJ LABORISTAJ TAĈMENTOJ. ESTIS KREATA EKDE MARTO 1917 EN ENTREPRENOJ SUB GVIDO DE BOLŜEVIKOJ.
MILIT-REVOLUCIAJ KOMITATOJ SURLOKE
MILIT-REVOLUCIA KOMITATO. IĜIS ORGANO POR EFEKTIVIGO DE LA RIBELO EN LA ĈEFURBO. ESTIS KREITA LAŬ PROPONO DE CK DE LA PARTIO ĈE LA PETROGRADA SOVETO.
MILIT-REVOLUCIAJ KOMITATOJ SURLOKE ESTAS BATALORGANOJ, KIUJ ESTIS KREATAJ DE LA SOVETOJ LAŬ INICIATO DE LA BOLŜEVIKOJ. ILIN PARTOPRENIS REPREZENTANTOJ DE DIVERSAJ KLASOJ, SOCIAJ TAVOLOJ.
EN LA OKTOBRA ARMITA RIBELO EN PETROGRADO LA BOLŜEVIKA PARTIO SIN APOGIS JE GRANDAJ ARMITAJ FORTOJ. AVANGARDE ESTIS RUĜA GVARDIO, KIU DUM LA BATALO KRESKIS ĜIS 40 MIL BATALANTOJ.
BUBNOV
DZERĴINSKIJ
SVERDLOV
MILIT-REVOLUCIA CENTRO PRI GVIDADO DE LA RIBELO
STALIN
URICKIJ
TIA ESTIS POLITIKA ORGANIZO DE LA RIBELO


OKTOBRO DE 1917
POR KIO MI BATALAS: ĈU POR KONSTANTINOPOLO AŬ POR LA LIBERA RUSIO? KIAL NI TIOM DA JAROJ DEVAS SIDI EN TRANĈEOJ?!
LABORISTOJ KOMENCIS FORIGI ADMINISTRANTARON KAJ PRENI GVIDADON EN SIAJN MANOJN.
JAM TEMPAS FORDONI LA UZINON!
LA SOLDATOJ KONVINKIĜIS, KE ONI VOLAS DEVIGI ILIN LA KVARAN VINTRON PUTRI EN TRANĈEOJ, KAJ EKDIZERTIS DE LA FRONTO.




TIA ESTIS SITUACIO EN LA LANDO.
LA KAMPARANOJ FORPELADIS BIENULOJN, ALPROPRIGADIS TERON, LABORILARON KAJ DISDIVIDIS ILIN INTER SI.
AKTIVIĜIS LA BATALO DE LA SUBPREMATAJ ETNOJ. ĜI KUNIĜIS EN UNUECA FRONTO KUN LA TUTLABORISTARA KAJ KAMPARANA MOVADO.
VETURU DO, SINJORO, FOR DE LA MINACO! NI SEN VI IEL TRAVIVOS...
ATENDU, ATENDU, ANKAŬ MI ESTAS POR DEMOKRATIO! POR LIBERO KAJ EGALECO DE POPOLOJ!


MINISTRO PRI KOMERCO
MINISTRO PRI FINANCOJ
BURĜAJ PARTIOJ
LA REGANTAJ KLASOJ NE POVIS RETENI LA KATASTROFON




KONVINKIĜINTE PRI NEKOMPETENTECO DE LA PROVIZORA REGISTARO KAJ SENPERSPEKTIVECO DE LA PROGRAMOJ DE LA ETBURĜAJ PARTIOJ, LA NEPARTIAJ DEPUTITOJ DE LA SOVETOJ SUBTENADIS LA BOLŜEVIKOJN KAJ ILIAN REALECAN PROGRAMON DE SOCIAJ REFORMOJ.
RUSIA EKONOMIO
BURĜAJ PARTIOJ
REGISTARO


EN LABORISTAJ KVARTALOJ LA BOLŜEVIKOJ PROPAGANDIS LA SLOGANON "TUTAN POTENCON — AL LA SOVETOJ!"
TUTAN POTENCON — AL LA SOVETOJ!
VI ĈI TIE MALSATAS, SED LA MEMBROJ DE SOVETO ANANASOJN MANĜEGAS.
DU MONDOJ JEN-JEN KOLIZIOS
LA KONTRAŬREVOLUCIULOJ INSTIGIS LA POPOLON MURDI BUTIKPOSEDANTOJN KAJ SOCIALISTAJN GVIDANTOJN.
POGROMO EN LA BUTIKO DE LA KOMERCISTO PUPKIN!
BOLŜEVIKOJ ESTAS LA PLEJ DANĜERAJ MALAMIKOJ DE LA REVOLUCIO!
LA ARMEA MINISTRO PROPONIS PACKONTRAKTI KUN LA GERMANOJ KAŜE DE LA ALIANCANOJ!




EN LA STRATOJ DE PETROGRADO
LA REGISTARO ĈIUTAGE IĜIS PLI KAJ PLI SENPOVA. EĈ LA URBA ADMINISTRADO RUINIĜIS. EN ĴURNALAJ PAĜOJ ABUNDIS INFORMOJ PRI LA PLEJ AŬDACAJ RABOJ KAJ MURDOJ, SED LA KRIMULOJ RESTIS SENPUNAJ.
LA LABORISTAJ PATROLOJ NOKTE GARDIS STRATOJN, FORPELANTE RABISTOJN KAJ REKVIZICIANTE ARMILOJN, KIUJ TRAFIS ILIAJN MANOJN.
DE LA TUTA LANDO KUNVENIS DELEGITOJ POR LA 2-A TUTRUSIA KONGRESO DE SOVETOJ, KIU DEVIS BALDAŬ KOMENCIĜI.
REGISTRADO DE DELEGITOJ



EN LA VINTRA PALACO ESTAS KERENSKIJ KAJ MINISTROJ.
MI ESTAS KONDAMNITA HOMO, AL MI ESTAS TUTE EGALE, KIO OKAZOS AL MI, SED MI KURAĜE DEKLARAS, KE ĈIO MISTERA EN LA EVENTOJ ESTAS KLARIGEBLA PER LA SENPRECEDENCA PROVOKO, FARITA DE LA BOLŜEVIKOJ EN LA URBO.
ĈU EFEKTIVE KERENSKIJ DEKLARIS PRI TIO?!
MI MEM LEGIS EN ĴURNALO.




114
JES, TIA REGISTARO NE LONGE REGOS!
NUN ESTAS BEZONATA NUR UNU PUŜO – KAJ TIU POTENCO FALOS!
VIDEBLAS, KE LA POTENCO EN PETROGRADO ŜANĜIĜOS HODIAŬ–MORGAŬ...
DO, KIAM ĜUSTE: ĈU HODIAŬ AŬ MORGAŬ?!
ĈU HODIAŬ AŬ MORGAŬ?!..
EN LA HISTORIO DE LA RUSIA REVOLUCIO VENIS TURNA MOMENTO...



TIU NUMERO DE BOLŜEVIKA ĴURNALO, LAŬ OPINIO DE KERENSKIJ, NE DEVUS APERI.
RABOĈIJ PUTJ
LA PROVIZORA REGISTARO TRANSIRIS AL OFENSIVO
LA 24-AN DE OKTOBRO LA REGISTARO ORDONIS ATAKI TIPOGRAFION DE LA ĴURNALO "RABOĈIJ PUTJ" (TIEL TIAM NOMIĜIS "PRAVDA".)





NE LASU LA ARMETRUPOJN DE LA PROVIZORA REGISTARO EN PETROGRADON
LA KROZŜIPO "AŬRORO" TRANSDONAS ALVOKON.
ARMETRUPOJ DE LA PROVIZORA REGISTARO PROVIS LEVI PONTOJN, SED LA RUĜA GVARDIO DEFENDIS ILIN.
KAJ SAMTEMPE KIRASAŬTOJ DE LA REVOLUCIAJ TRUPOJ KONCENTRIĜAS ĈE LA INSTITUTO SMOLNIJ — STABEJO DE LA REVOLUCIO.


KAMARADOJ!
MI SKRIBAS TIUJN ĈI LINIOJN VESPERE LA 24-AN, LA SITUACIO ESTAS EKSTREME KRIZA. ESTAS PLEJ KLARE, KE NUN, JAM EFEKTIVE, PROKRASTO DE RIBELO MORTON EGALAS.
EL LA LETERO DE V.I.LENIN AL LA MEMBROJ DE CK.
VESPERE LA 24-AN DE OKTOBRO EL DOMO ĈE ANGULO DE STRATO SERDOBOLSKAJA KAJ AVENUO SAMSONJEVSKIJ ELIRIS HOMO... NENIU EL PRETERPASANTOJ IMAGIS, KE POST KELKAJ HOROJ ĜUSTE LI EKGVIDOS LA RIBELON. EN SMOLNIJ IRIS LENIN.
KIEN VI VETURAS, KARULO?
NI VETURAS FARI LA REVOLUCION.
604




SMOLNIJ.
MILIT-REVOLUCIA CENTRO.
NI DEVAS AGI POR KE EN LA TAGO DE MALFERMO DE LA KONGRESO DE LA SOVETOJ NI POVU DIRI AL ĜI: „JEN ESTAS LA POTENCO! KION VI FAROS KUN ĜI?!”



SMOLNIJ — STABEJO DE LA REVOLUCIO. TIE ĈI KONCENTRIĜAS LA REVOLUCIAJ FORTOJ.
MILITŜIPOJ ENIRIS EN NEVA KAJ PRETAS PARTOPRENI LA RIBELON.
10
9
8


12
1
NOKTE DE LA 24-A AL LA 25-A DE OKTOBRO LA RIBELANTOJ OKUPIS...
ĈEFPOŜTEJON 1.25.
STACIDOMON NIKOLAEVSKIJ 2.00.
ELEKTROCENTRALON 2.10.
NI DEVAS ĜIS MATENO OKUPI LA BAZAJN STRATEGIAJN PUNKTOJN.
DES PLI, KE LA TRUPOJ DE LA PROVIZORA REGISTARO JAM KONSTRUAS BARIKADOJN ĈE LA VINTRA PALACO.
4
5


KAJ FRUMATENE...
ĈIRKAŬ LA 6-A HORO MATENE LA MARISTOJ DE GVARDIA FLOTA ŜIPANARO EKPOSEDIS LA ŜTATAN BANKON.
KIAL DO TIEL FRUE? KIOM DA MONO AL VI?
AL NI-ĈION!
ŜTATA BANKO
JE LA 8-A MATENE LA RUĜGVARDIANOJ DE DISTRIKTOJ MOSKOVSKIJ KAJ NARVSKIJ OKUPIS VARSOVIAN STACIDOMON...
HEJ, PORTU LA PAKAĴOJN!
MEM PORTU!
KIO DO OKAZAS?!
LA REVOLUCIO OKAZAS, SINJORINO...




JE LA 7-A MATENE LA SOLDATOJ DE REGIMENTO KEKSGOLMSKIJ OKUPIS CENTRAN TELEFONSTACION.
KIA MI ESTAS, FRAŬLINO?!
FRAŬLINO, KONEKTU!
LA BOLŜEVIKOJ SUKCESIS ORGANIZI LA RIBELON TIEL STRIKTE, KE JAM MATENE LA URBO ESTIS EN MANOJ DE RIBELINTOJ...
LA KROZŜIPO "AŬRORO" PROKSIMIĜIS AL LA VINTRA PALACO JE LA DISTANCO DE REKTA KANONPAFO.


NIA REGISTARO RENKONTOS UNUANIMAN SUBTENON!
KIUJ ESTAS KONTRAŬ NI — TIUJN SENPROKRASTE LIKVIDI!
KIUJ ESTAS LA BOLŜEVIKOJ? NENIU SUBTENOS ILIN!
ĈIUJ DIRAS, KE VI JAM ESTAS RENVERSITAJ. POR KIO DO KUNSIDI? TRINKU TEON—KAJ HEJMEN!
ILI DAŬRE KUNSIDAS.
VERŜAJNE ILI ANKORAŬ NE SCIAS, KE ILIA POTENCO FINIĜIS.





MATENE LA 25-AN DE OKTOBRO
LA MILIT-REVOLUCIA KOMITATO AKCEPTIS LA ALVOKON "AL CIVITANOJ DE RUSIO!", VERKITAN DE LENIN.
LABORISTO KAJ SOLDATO
AL CIVITANOJ DE RUSIO!
LA PROVIZORA REGISTARO ESTAS RENVERSITA...
LA AFERO, POR KIU BATALIS LA POPOLO,... TIU AFERO ESTAS GARANTIITA...
VIVU LA REVOLUCIO DE LA LABORISTOJ, SOLDATOJ KAJ KAMPARANOJ!


VINTRA PALACO.
LASTAJ HOROJ ANTAŬ STURMO. RAKONTAS ATESTANTO LA USONA ĴURNALISTO JOHN REED.
LA VIRINA BATALIONO DECIDIS RESTI FIDELA AL LA PROVIZORA REGISTARO!
ŜLOSU VIN, FRAŬLINOJ. SE IO OKAZOS, VI ESTOS EKSTER DANĜERO.
KIAL LA PORDO ESTAS ŜLOSITA?
POR KE LA SOLDATOJ NE FORIRU.
BUM!
TIO ESTAS PAFO DE "AŬRORO" KONTRAŬ LA VINTRAN PALACON.


ĈU MI POVAS INTERVJUI PREMIER-MINISTRON?
ALEKSANDR FJODOROVIĈ ESTAS EKSTREME OKUPITA... VERDIRE, LI NE ESTAS ĈI TIE...
LI FORVETURIS AL LA FRONTO. KAJ, VIDU, NE SUFIĈIS GASOLINO POR LIA AŬTOMOBILO. ONI DEVIS PRUNTEPRENI EN BRITA HOSPITALO.
NI SAVU RUSION KAJ DEMOKRATION!
KERENSKIJ
MI ŜATUS FORVETURI EL RUSIO. MI DECIDIS ALIĜI USONAN ARMEON. ĈU VI BONVOLOS HELPI AL MI EN TIO?
A PALACO ESTAS NEDIFEKTITA. DO MISTRAFIS.
POR RENVERSI VIAN REGISTARON SUFIĈAS EĈ SENOBUSA PAFO.


LA POTENCO ESTAS EN LA MANOJ DE LA POPOLO.
LA LABORISTA KAJ KAMPARANA R CIO,
PRI LA BEZONO DE KIU ĈIAM PAROLIS LA BOLŜEVIKOJ
OKAZIS.
DO, LA AFERO ESTAS GAJNITA?
NE, ĈIO NUR COMENCIĜAS. NECESAS ANKORAŬ TRE MULTON FARI.





LA 25-AN DE OKTOBRO JE LA 10-A KAJ 40 VESPERE
DUM KULMINO DE LA ARMITA RIBELO EN SMOLNIJ MALFERMIĜIS LA DUA TUTRUSIA KONGRESO DE LA SOVETOJ DE LABORISTAJ KAJ SOLDATAJ DEPUTITOJ.
LA 26-AN DE OKTOBRO JE LA 2-A KAJ 10MINUTOJ NOKTE ESTIS ARESTITAJ MINISTROJ DE LA PROVIZORA REGISTARO... LA OFICIROJN KAJ SOLDATOJN, KIUJ ESTIS EN LA PALACO, ONI SENARMIGIS KAJ FORLASIS..."
NI DEKLARAS, KE NI NE DETRUIS LA VINTRAN PALACON, NE MORTIGIS NEMILITISTAJN LOĜANTOJN, SED DEFENDIS LA LIBERON KAJ REVOLUCION DE LA KONTRAŬREVO-LUCIULOJ. PAFADO DE NIAJ KANONOJ FARUS AMASON DA ŜTONOJ NE NUR EL LA VINTRA PALACO, SED ANKAŬ EL LA NAJBARAJ STRATOJ... NE KREDU AL ONIDIROJ! ESTIS FARITA NUR UNU SENOBUSA PAFO...
EL LA LETERO DE LA ŜIPANARO DE LA KROZŜIPO "AŬRORO" EN REDAKCION DE LA ĴURNALO "PRAVDA".
АВРОРА


SMOLNIJ
TIE ĈI OKAZIS LA DUA TUTRUSIA KONGRESO DE LA SOVETOJ
LA DUA TUTRUSIA KONGRESO DE LA SOVETOJ, MALFERMITA JE LA 10-A HORO KAJ 40 MINUTOJ VESPERE LA 25-AN DE OKTOBRO, FERMIĜIS LA 27-AN DE OKTOBRO JE LA 5-A KAJ 15 MINUTOJ MATENE.


KION ILI POVAS DECIDI NUR DUM 30 HOROJ?! KAJ ĜENERALE, KION ILI POVAS, TIUJ BOLŜEVIKOJ?!
DUM TIU DIURNO KAJ KELKAJ HOROJ LA POPOLOJ DE RUSIO RICEVIS TION, PRI KIO ILI REVIS DUM JARCENTOJ, TION, KION NE POVIS KAJ NE VOLIS DONI AL ILI CAROJ, LA PROVIZORA REGISTARO KAJ AJNA ALIA REGISTARO, KROM VERE POPOLA—LABORISTA-KAMPARANA.
TION MANIFESTIS JAM UNUAJ LEĜOJ DE LA SOVETA POTENCO.




LA 27-A DE OKTOBRO 1917
DEKRETO PRI PACO
PACO SEN ANEKSOJ KAJ KONTRIBUCIOJ!
...NI PROPONAS AL ĈIUJ MILITANTAJ POPOLOJ KAJ REGISTAROJ SENPROKRASTE KOMENCI TRAKTADON PRI PACO...
ĈESIGI LA MILITON!
DEKRETO PRI TERO
...POSEDRAJTO DE BIENULOJ POR LA TERO ESTAS ABOLATA SENPROKRASTE...
...SEN AJNA ELAĈETPAGO!
...LA BIENULOJ KUN LA TUTA ILIA VIVA KAJ NEVIVA ILARO, BIENAJ KONSTRUAĴOJ KAJ ĈIUJ APARTENAĴOJ TRANSIRAS AL DISPONO DE LA TERAJ KOMITATOJ KAJ SOVETOJ DE KAMPARANAJ DEPUTITOJ.


EN LA DUA TUTRUSIA KONGRESO DE LA SOVETOJ ESTIS FORMITA LA UNUA EN LA MONDO LABORISTA KAJ KAMPARANA REGISTARO —
SOVETO DE POPOLAJ KOMISAROJ
ONI DIRAS, LI DEVIS FORKURI EL LA VINTRA PALACO EN VIRINA VESTO.
PRO KIO DO ILI RENVERSIS KERENSKIJ?
MI PRAVE NE LASIS VIN EN VIRINAN BATALIONON, MAŜA.
PROMESO DE LA SENPROKRASTA PACO ESTAS MENSOGO! PROMESO DE PANO – TROMPO!
PROMESO DE TERO – FABELO!
NE KREDU AL PROMESOJ DE LA BOLŜEVIKOJ!
MINISTRO





KIEL ĈEFO DE LA REGISTARO ESTIS ELEKTITA LENIN. KONTROLO PRI LA AGADO DE LA POPOLAJ KOMISAROJ KAJ RAJTO PRI ILIA EKSIGO APARTENIS AL LA TUTRUSIA KONGRESO DE LABORISTAJ, SOLDATAJ KAJ KAMPARANAJ DEPUTITOJ AŬ AL TIES CENTRA PLENUMKOMITATO.
ĈU VI LEGIS, KION ONI SKRIBAS? JEN AŬSKULTI: "KAJ KONCERNE LA KONGRESON DE LA SOVETOJ NI ASERTAS, KE NENIU KONGRESO DE LA SOVETOJ OKAZIS."
MI TIEL SUPOZIS!
NU BONE, LA CARON NI DETRONIGIS. UNUE...
LA PROVIZORAN REGISTARON DISPELIS. DUE...
SED KIU NIN REGOS?!
NI MEM REGOS! LA BOLŜEVIKOJ DIRAS, KE ĈIU EL NI PARTOPRENOS ŜTATADMINISTRADON.


TIA BONA ESTIS UZINETO — ONI NACIIGIS... ANKAŬ MI ESTAS POR LIBERO. SED ESTAS IA "POPOLA POTENCO".
LA TERON FORPRENIS! SEN AJNA ELAĈETPAGO! TIO JA ESTAS ARBITRECO!
ĈU TIO ESTAS LIBERO?! ONI SENIGIS MIN DE BALOTRAJTOJ.
JES, TIO ESTIS LA POPOLA POTENCO DE LA LABORISTA KLASO, KIU ALIANCE KUN LA KAMPULARO KREADIS SOCION
SEN EKSPLUATADO.




DUM REGADO DE LA CARO EN LA ŜTATA KONSILANTARO INTER 400 DEPUTITOJ ESTIS NUR DEKO DA LABORISTOJ, KAJ ANKORAŬ MALPLI DA KAMPARANOJ. KAJ NUN LA REGISTARO ESTAS NI!
MI ESTAS RUSA INTELIGENTO. ONI NE FORIGAS NIN DE PARTOPRENO EN LA VIVO DE LA LANDO, MALE, INVITAS KUNLABORI KUN LA SOVETA POTENCO. KAJ NE NUR NIN, SED ANKAŬ EKS-KAPITALISTOJN, OFICIROJN DE LA CARA ARMEO. MULTAJ KONSENTAS... ANKAŬ MI... JA RUSIO FRONTAS SENPRECEDENCAJN TASKOJN.
NI SENIGIS DE BALOTRAJTOJ NUR EKSPLUATANTOJN, VIVANTAJ KONTRAŬ NELABORAJ ENSPEZOJ. ILI ESTAS NUR 2 PROCENTOJ DE LA LOĜANTARO. KAJ NI —ABSOLUTA PLIMULTO— NUN HAVAS BALOTRAJTON.
TASKOJ DE LA POPOLA POTENCO:
LIKVIDO DE DIVIDO DE LA SOCIO JE MALAMIKAJ KLASOJ,
NENIIGO DE ĈIA GRUNDO POR EKSPLUATADO DE LA HOMO FAR HOMO,
KREO DE NOVA ŜTATA 'APARATO,
KREO DE NOVA, SOCIALISMA EKONOMIO,
KULTURA REVOLUCIO.


LA 2-AN DE NOVEMBRO 1917 LA SOVETA REGISTARO AKCEPTIS "DEKLARACION PRI LA RAJTOJ DE LA POPOLOJ DE RUSIO", DEKLARANTAN BAZAJN PRINCIPOJN POR SOLVO DE LA NACIA DEMANDO.
EGALECO KAJ SUVERENECO DE LA POPOLOJ DE RUSIO.
DE GENERACIO AL GENERACIO NI BUŜE TRANSDONADIS NIAN HISTORION, LEGENDOJN, MITOJN – NI NE HAVIS SKRIBON. NUN NI HAVOS ĜIN! KAJ POSTE... NI HAVOS NIAJN SCIENCISTOJN, VERKISTOJN, INĜENIEROJN...
LIBERA EVOLUO DE ETNAJ MINORITATOJ KAJ GRUPOJ, LOĜANTAJ SUR LA TERITORIO DE RUSIO.
ABOLO DE ĈIUJ KAJ AJNAJ ETNAJ KAJ ETNO-RELIGIAJ PRIVILEGIOJ KAJ LIMIGOJ.




RAJTO DE LA POPOLOJ DE RUSIO POR LIBERA MEMDETERMINO INKLUZIVE APARTIĜON KAJ KREON DE LA SUVERENA ŜTATO.
HODIAŬ, LA 31-AN DE DECEMBRO 1917, LA SOVETA REGISTARO AGNOSKIS ŜTATAN SENDEPENDECON DE FINNLANDO – RESPONDE AL NIA PETO PRI APARTIĜO.
HODIAŬ NI MALFERMAS LA UNUAN EN LA HISTORIO DE NIA POPOLO LERNEJON, KIE ĈIUJ POVOS SENPAGE STUDI EN GEPATRA LINGVO.
PEREIS RUSIO! PEREIS IMPERIO! LA BOLŜEVIKOJ DECIDIS ĈION DISIPI!
TIOM DA JAROJ KUN AMO, LAŬ EROJ ESTIS KOLEKTATA LA IMPERIO... EBLAS DIRI, PER TIUJ ĈI MANOJ. EĤ!


NOKTE AL LA 26-A DE OKTOBRO, SAMAN NOKTON, KIAM ESTIS OKUPITA LA VINTRA PALACO, EN PETROGRADO ESTIS KREITA "KOMITATO POR SAVO DE LA PATRIO KAJ REVOLUCIO".
KIO ESTAS TIU KOMITATO? VERŜAJNE, HELPE AL LA NOVA POTENCO?
NE! VIDU! JEN ESTAS LA UNUA DOKUMENTO DE TIU KOMITATO!
AL CIVITANOJ DE RUSIA RESPUBLIKO.
LA 26-AN DE OKTOBRO LA BOLŜEVIKOJ EN PETROGRADO KONTRAŬ LA VOLO DE LA REVOLUCIA POPOLO KRIME ARESTIS PARTON DE LA PROVIZORA REGISTARO, MALFONDIS PROVIZORAN KONSILION DE RUSIA RESPUBLIKO KAJ DEKLARIS NELEĜAN POTENCON.
NE AGNOSKU LA POTENCON DE LA BOLŜEVIKOJ!
NE PLENUMU ILIAJN ORDONOJN!
LEVIĜU POR DEFENDO DE LA PATRIO KAJ REVOLUCIO!




VIDU, KIEL LERTE! ŜAJNE, ĜUSTE ILI ESTAS POR LA REVOLUCIO!
ILI DUME NUR SUR PAPERETOJ SKRIBAS, SED KERENSKIJ, ONIDIRE, JAM DIREKTIS LA TRUPOJN KONTRAŬ PETROGRADON.
KIUJ NOVAĴOJ? KIE ESTAS KERENSKIJ?
ONI DIRAS, KE LI ESTAS NUR OK KILOMETROJN FOR DE PETROGRADO. ĈU VI AŬDIS, LI PROMESIS VENI EN PETROGRADON SUR BLANKA ĈEVALO.
ĈU VERE, KE ĈIUJ BOLŜEVIKOJ FORKURIS EN "AŬRORON".











**LA 30-AN DE OKTOBRO** LA TRUPOJ SUB GVIDO DE KERENSKIJ KAJ CARA GENERALO KRASNOV KOMENCIS OFENSIVON KONTRAŬ PETROGRADON, KAJ POST MULTHORA BATALO KONTRAŬ REVOLUCIAJ TRUPOJ ESTIS HALTIGITAJ. TIEL LA PETROGRADA PROLETARO REBATIS LA UNUAN ATAKON DE LA KONTRAŬREVOLUCIO.

**LA 1-AN DE NOVEMBRO** LA RIBELO ESTIS LIKVIDITA. KRASNOV KAJ LIA STABO ESTIS ARESTITAJ. KERENSKIJ KAŜE FUĜIS AL DON, POR KOLEKTADI NOVAJN KONTRAŬREVOLUCIAJN FORTOJN.







LA NOVA ŜTATO ĴUS NASKIĜIS,
SED LA MULTNOMBRAJ MALAMIKOJ EN KAJ EKSTER LA LANDO JAM KOMENCIS ORGANIZI KOMPLOTOJN KONTRAŬ ĜI.
LA 2-AN DE DECEMBRO 1917
RUSIO KONTRAKTIS ARMISTICON KUN GERMANIO.
LA BOLŜEVIKOJ MIKSIS NIAJN PLANOJN. NECESAS FARI ORDON EN RUSIO. DO, NI OKUPACIOS KAŬKAZION, DONON, KUBANJON, ORENBURGON...
ĈU NIA AGAD-ZONO ESTOS SIBERIO KAJ FORA ORIENTO?
BONEGE! KAJ NIA AGOSFERO ESTU BESARABIO, UKRAINIO, KRIMEO...
NI VIDOS!
FRANCIO
BRITIO
USONO
JAPANIO
ENTENTO
LA 10-AN DE DECEMBRO 1917
BRITIO KAJ FRANCIO KONTRAKTIS PRI DIVIDO DE LA SFEROJ DE MILITAGOJ KONTRAŬ RUSIO. EN LA KONTRAKTO ILI KONSIDERIS ANKAŬ INTERESOJN DE JAPANIO KAJ USONO.
TAMEN LA MALAMIKAJN AGOJN KONTRAŬ LA SOVETA RUSIO LA MONDA IMPERIISMO KOMENCIS PLI FRUE.


ENTENTO KAJ USONO
KOZAKA HETMANO
CARA GENERALO
BASMAĈO
UKRAINIA NACIISTO...


ANKORAŬ NE ĈIO ESTAS PERDITA! NIAJ EKSTERLANDAJ AMIKOJ NE LASOS NIN EN LA PLAGO!
ĈU LA BOLŜEVIKOJ AŬDACAS KONTRAŬ ENTENTO? NI AŬDIS, KE LA 14-AN DE NOVEMBRO BRITIO, FRANCIO KAJ ITALIO DECIDIS SUBTENI LA KAŬKAZIAJN NACIISTOJN.
LA 9-AN DE DECEMBRO LA KONFERENCO DE ENTENTO EN PARIZO DECIDIS, KE NECESAS TENI LIGOJN KUN LA KONTRAŬBOLŜEVIKAJ REGISTAROJ DE UKRAINIO, KAŬKAZIO, SIBERIO KAJ KREDITI ILIN.

MALGRAŬ LA ESPEROJ DE LA RUSIA BURĜARO, SPITE AL LA KOMPLOTOJ DE LA MONDA IMPERIISMO, AL LA KONTRAŬREVOLUCIAJ RIBELOJ, ORGANIZATAJ DE MALAMIKOJ DE LA REVOLUCIO, LA SOVETA POTENCO TRIUMFE EKMARŜIS TRA LA LANDO.

LA POTENCO DE SOVETOJ RELATIVE FACILE ESTIĜIS EN LA INDUSTRIAJ REGIONOJ, KIE ESTIS FIRMAJ BOLŜEVIKAJ ORGANIZOJ, MULTNOMBRA LABORISTA KLASO.
TAMEN NE SIMPLE KAJ NE SENSANGE RUSIO IĜIS SOVETA.









EKDE LA 25-A DE OKTOBRO ĜIS LA 2-A DE NOVEMBRO EN MOSKVO DAŬRIS BATALOJ.
LA VENKO DE LA PROLETARO ESTIS ATINGITA PERE DE GRANDAJ OFEROJ. DUM LA RIBELO ESTIS MURDITAJ ĈIRKAŬ MIL HOMOJ.



FINE DE OKTOBRO – KOMENCE DE NOVEMBRO 1917 LA SOVETOJ PRENIS LA POTENCON EN DUONTERITORIO DE ĈEBALTIO.
EN ESTONIO
SENREZULTOS, SINJORO OFICIRO! EĈ NE UNU VIA VAGONARO KUN SOLDATOJ TRAFOS PETROGRADON!
KIO OKAZIS? LIBERIGU LA VOJON!
EN LA TAGOJ DE LA OKTOBRA RIBELO EN PETROGRADO LA ESTONAJ BOLŜEVIKOJ EKKONTROLIS ĈIUJN STRATEGIE GRAVAJN PUNKTOJN KAJ NE ALLASIS MOVIĜON DE LA KONTRAŬREVOLUCIAJ TRUPOJ AL LA RIBELANTA PETROGRADO.




EN LATVIO
NI NE KOMPRENAS! POR KIO ONI SENDAS TIUJN SOLDATOJN AL PETROGRADO?
ILI ESTAS NIAJ LATVAJ FUSILISTOJ, KIUJ KVARDEKMILOPE TRANSIRIS AL LA FLANKO DE LA REVOLUCIO. PARTO DA ILI FORVETURAS POR DEFENDI PETROGRADON.
FELIĈAN VOJON ĜIS PETROGRADO!
LA LATVAJN FUSILISTOJN KARAKTERIZIS GRANDA HEROECO DUM LA BATALOJ EN LA RUSI-GERMANIA FRONTO, ILI PARTOPRENIS EN LA OKTOBRA REVOLUCIO, FIRME BATALIS POR LA SOVETA POTENCO EN LA FRONTOJ DE LA ENLANDA MILITO.
NEMALMULTE DA GRANDAJ SOVETIAJ ARMEESTROJ DEVENIS EL TIES VICOJ.



7–670


La uzino "Arsenal" iĝis centro de la armita ribelo en Kievo. La 29-an de oktobro la laboristoj rebatis kelkajn atakojn de la kontraŭrevoluciaj trupoj.
Ĉi tie situis arsenaloj de armiloj, kiujn la trupoj de la Provizora Registaro intencis forpreni de la laboristoj. Dum tri tagnoktoj teruraj bataloj daŭris en Kievo. Sed kiam la ribelintoj atingis plenan venkon, tute alia forto uzurpis la potencon en la urbo.
La bolŝevikoj perdu sangon! Dum ili batalas kontraŭ la trupoj de Kerenskij, ni deklaras nin sendependa de la Sovetoj Ukraina Popola Respubliko!
CENTRA RADAO
La ukrainia naciisma burĝaro uzis la venkon de la revoluciaj fortoj de la laboristoj kaj soldatoj. La 7-an de novembro tiel nomata "Centra Radao (Konsilio)" uzurpis la potencon en la urbo kun helpo de la trupoj, kiuj estis sub influo de la naciistoj. Estis bezonataj grandegaj oferoj flanke de la armitaj taĉmentoj de laboristoj kaj soldatoj, por ke post tri monatoj la soveta potenco establiĝu en Kievo kaj en la tuta Ukrainio.




La burĝaro penas uzi la momenton por uzurpi la potencon ne nur en Ukrainio. Nun estas malfacile eĉ nombri kvanton de aperintaj en Rusio pseŭdoregistaroj...
Ili estis tre diversaj, sed ilin unuigis la sama malicega malamo al la popolo, ribelinta kontraŭ ekspluatado, al la Soveta potenco.
Kiu estas kontraŭ la Siberia Regiona Konsilantaro?!
La tutan potencon al la Kubanja Radao!
Hura al la Terska-Dagestana Registaro!
Vivu la armea registaro de Dono!


LA SOVETA POTENCO ESTIS VENKANTA EN KOLIZIO DE DU KLASOJ: PROLETARO KAJ BURĜARO. TAMEN EN LA VASTEGA RUSIO ESTIS PLURAJ TERITORIOJ, KIE ANKORAŬ REGIS PATRIARK-FEŬDAJ RILATOJ KAJ LA INDUSTRIO ESTIS EN ĜERMA STADIO: MEZAZIO, KAZAĤIO.
KIEL PASIS LA REVOLUCIO EN LA PERIFERIOJ DE RUSIO?
ANTAŬ LA 25-A DE OKTOBRO 1917.
MULAO
BAJO-FEŬDULO
RUSA GUBERNIESTRO
PRESKAŬ CENT PROCENTOJ DE LA LOĜANTARO DE TAĜIKIO KAJ TURKMENIO ESTIS ANALFABETAJ.
EL ĈIU CENTO DE KAZAĤOJ NUR DU KAPABLIS LEGI KAJ SKRIBI.
KIRGIZOJ TUTE NE HAVIS SKRIBON.
LA CARISMO VENIGIS VIAN POPOLON AL PLENA MIZERO KAJ SENRAJTECO. LA SOVETA POTENCO LIBERIGAS VIN DE PREMO, DONAS AL VI TERAREON KAJ RAJTON LIBERE LABORI SUR ĜI.




KAJ POST LA 25-A DE OKTOBRO 1917.
ĈU VI ĈESIGIS LABORON? ĈU EKDEZIRIS REVOLUCION? SED ĈU VI FORGESIS KE LA RUSOJ ESTAS VIAJ ĜISMORTAJ MALAMIKOJ? MI MONTROS AL VI LA REVOLUCION!
LA BOLŜEVIKOJ INTENCAS LIKVIDI NIAN ISLAMAN KONFESION! ALAHO MALBENOS VIN!
KAJ KIO ESTIS MALBONA POR VI? MI TIEL ZORGIS PRI VI. LABORU PLU, PRI NENIO PENSU.
SED MI PENSAS, KE VI ĈIUJ TUJ DENOVE EKSIDOS SUR MIAN KOLON.
KAJ ĈU LA BOLŜEVIKOJ NE DEVIGOS NIN PREĜI AL LA RUSA DIO?
LA 2-AN DE NOVEMBRO 1917
LA KONSILIO DE POPOLAJ KOMISAROJ AKCEPTIS "APELON AL ĈIUJ LABORANTAJ MUZULMANOJ DE RUSIO KAJ ORIENTO", EN KIU DEKLARIS LIBERAJ KAJ NETUŜEBLAJ LA NACIAJN KAJ KULTURAJN INSTITUCIOJN, KUTIMOJN KAJ KONFESIOJN DE MUZULMANOJ, GARANTIANTE AL ILI PLENAN LIBERON EN ARANĜO DE ILIA VIVO.



ESTIS VENANTA NOVA JARO DE LA NOVA ERAO, LA UNUA JARO EN RUSIO POST LA REVOLUCIO, LA JARO 1918...
HEJTAĴO SUFIĈUS NUR POR KELKAJ TAGOJ. EVIDENTE, NECESUS FERMI LA UZINON! KAJ JEN LA NOVJARA DONACO DE LA BALTA FLOTO – TRI MIL TUNOJ DA KARBO EL LA PROVIZO DE LA MILITŜIPOJ.
TUTEGALE ĜI ESTAS NUN NENIES. PREFERE MI DONACOS ĜIN AL LA EDZINO SUB NOVJARAN ABION.
"CIVITANOJ! LA MALNOVAJ MASTROJ FORIRIS. LA GRANDEGA HEREDAĴO RESTIS POST ILI. NE TUŜU EĈ UNU ŜTONON, GARDU LA MONUMENTOJN, KONSTRUAĴOJN, ANTIKVAĴOJN, DOKUMENTOJN. ĈIO ĈI ESTAS NIA HISTORIO, VIAJ FIERAĴOJ".
NE NENIES, SED LA NIA! ĈU VI LEGIS LA PROKLAMAĴON?




SOVETOJ RICEVOS BONAJN DONACETOJN AL LA NOVJARO! LA HOMOJ, FIDELAJ AL LA RUSIA IMPERIO, KOLEKTAS LA FORTOJN. EKSTERLANDE ONI SUBTENOS NIN! NI DRINKU DO POR TIO, KE LA JARO 1917 ESTU LA LASTA JARO POR LA BOLŜEVIKOJ.
ĈU VI LEGIS LA ĴURNALOJN? LA ALIANCANOJ ĜIS NUN SILENTAS, NE RESPONDAS AL NIA PROPONO PRI ARMISTICO!
PACO ESTUS LA PLEJ KARA DONACO POR LA RUSA POPOLO, KAJ NE NUR POR ĜI – POR ĈIUJ SIMPLAJ HOMOJ: GERMANOJ, FRANCOJ, ANGLOJ...
NI, LA FINANC-OFICISTOJ, PREPARIS NOVJARAN SURPRIZON AL LA BOLŜEVIKOJ – LA STRIKON!
PAĈJO, SED HODIAŬ ANKORAŬ NE ESTAS FESTO. KIAL VI NE ESTAS EN VIA LABOREJO?
PROKSIMIĜIS LA JARO 1918, LA JARO DE ESPEROJ KAJ MALTRANKVILOJ...

**ĈIU REVOLUCIO NUR TIAM ION VALORAS, SE ĜI KAPABLAS DEFENDI SIN...**

**V.I.LENIN**




MANKAS LA PLEJ NECESA: PANO, ALUMETOJ, EĈ SAPO...
LA NOVA POTENCO DEVAS ZORGI PRI PROVIZO DE LA LOĜANTARO.
NE ESTAS PER KIO SEMI, PLUGILO MANKAS, BRUTARO MANKAS...
KIEL DO NUTRI RUSION?!
LA UNUA JARO DE LA SOVETA POTENCO...
KIEL INSTRUI AL LA HOMOJ LA NOVAN VIVON, SE EN LA LANDO ESTAS MILIONOJ DA ANALFABETAJ?
LA PLEJ GRAVA TASKO NUN ESTAS LIKVIDI ANALFABETECON KAJ ALTIGI KULTURON DE LA POPOLO.




EN PETROGRADO NE FUNKCIAS ĈIU KVARA UZINO. MANKAS KRUDMATERIALOJ, HEJTAĴO.
NUN LA ĈEFA TASKO ESTAS ARANĜI FUNKCIADON DE LA INDUSTRIO.
DE KIO KOMENCI?
KIEL EBLAS PAROLI PRI IAJ ŜTATAJ TASKOJ, SE NE ESTAS SOLVITA LA DEMANDO PRI LA ŜTATA GVIDADO?
LA BOLŜEVIKOJ JA PROMESIS ARANĜI KONSTITUCIAN ASEMBLEON. KIAL DO ILI NE ARANĜAS?


POR KIU VI BALOTOS? MI POR LA ESEROJ, ONIDIRE ILI INTENCAS DONI AL NI TERAREON.
SED MI POR LA BOLŜEVIKOJ! DUM TIUJ INTENCAS, LA BOLŜEVIKOJ JAM DONAS.
BALOTADO POR LA KONSTITUCIA ASEMBLEO
LA KONSTITUCIAN ASEMBLEON LAŬ REZULTOJ DE LA BALOTADO ENIRIS REPREZENTANTOJ DE DIVERSAJ POLITIKAJ PARTIOJ DE RUSIO. EN LA INDUSTRIAJ CENTROJ LA BOLŜEVIKOJ ATINGIS DECIDAN SUKCESON EN LA BALOTADO.
LA BOLŜEVIKOJN SUBTENIS LA ĈEFA AMASO DA PROLETARO KAJ PRESKAŬ DUONO DA SOLDATOJ.
SED ĈU LA BOLŜEVIKOJ RISKOS KUNVENIGI LA KONSTITUCIAN ASEMBLEON? JA LA POTENCO JAM ESTAS EN ILIAJ MANOJ, SED TIE DIABLO SCIAS...
NI, BOLŜEVIKOJ, INTENCAS KUNVENIGI LA KONSTITUCIAN ASEMBLEON POR KE LA POPOLO PER TIO KONVINKIĜU PRI LA KONTRAŬREVOLUCIECO DE LA ETBURĜAJ PARTIOJ.




LA 5-AN DE JANUARO 1918 EN PETROGRADO LA SOVETA REGISTARO KUNVENIGIS LA KONSTITUCIAN ASEMBLEON.
NI RIFUZAS AGNOSKI...
PRI KIO DO EBLAS PAROLI KUN ILI? KIUN ILI REPREZENTAS?
LA POPOLO BATALIS NE POR REDONI DENOVE LA POTENCON AL LA BURĜARO!
АВРОРА
...LA DEKRETOJN DE LA SOVETA POTENCO
SINJOROJ! LA BOLŜEVIKOJ FORLASIS LA HALON.
POST FORIRO DE LA PLIMULTO VIA KUNVENO IĜIS SENSENCA!
"DEKLARACIO", AKCEPTITA LA 10-AN DE JANUARO 1918 EN LA 3-A TUTRUSIA KONGRESO DE SOVETOJ DEKLARIS RUSION RESPUBLIKO DE SOVETOJ DE LA LABORISTAJ, SOLDATAJ KAJ KAMPULAJ DEPUTITOJ, TRANSDONINTE AL ILI LA TUTAN PLENRAJTECON DE LA ŜTATA POTENCO.


NI BEZONAS PANON, HEJTAĴON...
TRANSPORTON, PRODUKTILOJN, KVALIFIKITAJN KADROJN...
SED LA LANDO PLEJE BEZONAS TEMPON. LA POPOLO, ELTURMENTITA PRO LA MILITO, ASPIRAS PACAN PERIODON.
LA SOVETA RUSIO PROPONIS INTERPACIĜON AL ĈIUJ MILITANTAJ ŜTATOJ, SED ENTENTO NE SUBTENIS LA PROPONON.
RESPONDE AL LA PROPONO PRI LA PACO SEN ANEKSOJ KAJ KONTRIBUCIOJ LA GERMANIAJ IMPERIISTOJ PREZENTIS LA UZURPECAJN POSTULOJN.
ĈU VI AŬDIS, SOVETOJ EFEKTIVIGAS EN BREST-LITOVSK INTERTRAKTADON KUN GERMANIO PRI PACO?
NECESAS KONFESI, KE LA BOLŜEVIKOJ TURNIS SIN ANKAŬ AL ENTENTO, SED TIU EĈ PAROLI PRI LA PACO NE DEZIRAS.
ĈU TIO LICAS, JA TIO ESTAS PERFIDO RILATE AL LA ALIANCANOJ!
SINJOROJ, SUFIĈAS PRI LA POLITIKO. LA GERMANIESTRO ATENDOS, SED LA TEO JA MALVARMIĜOS!




KUNSIDO DE CK
LA PACKONTRAKTO ESTUS MALGLORA POR LA PARTIO.
DAŬRIGO DE LA MILITO PROKSIMIGOS LA MONDAN REVOLUCION.
LA PACKONTRAKTO ESTAS SOLA EBLECO SAVI LA REVOLUCION.
ANTAŬ LA JUNA ŜTATO APERIS LA DEMANDO: ĈU KONTRAKTI LA PACON PER PEZA PREZO, SED SAVI LA RESPUBLIKON, AŬ DAŬRIGI LA MILITON, SUBMETANTE LA SOVETAN POTENCON AL MINACO DE PEREO.
PRI PACO ĈIUJ PAROLIS: FILISTROJ, LABORISTOJ, MALAMIKOJ...
ĜUSTE! LA GERMANOJ EKSTERMU LA BOLŜEVIKOJN, KAJ NI POSTE JA ORDIGOS ĈION.
NECESAS ĈIURIMEDE NE ALLASI INTERPACIĜON.










LA 3-AN DE MARTO EN BREST-LITOVSK LA SOVETIA DELEGACIO SUBSKRIBIS LA RABAN PACAN KONTRAKTON.




PETROGRADO ESTIS FAKTE EN SIEĜSTATO, KAJ LA SOVETA REGISTARO FRUNTE KUN LENIN TRANSLOKIĜIS LA 11-AN DE MARTO 1918 EN MOSKVON. MOSKVO IĜIS ĈEFURBO DE LA SOVETA ŜTATO. LENIN SKRIBIS EN TIUJ TAGOJ: "NEELTENEBLE PEZAJ ESTAS LA PACKONDIĈOJ. TAMEN LA HISTORIO REVENĜOS... LA ESTONTECO MALGRAŬ ĈIUJ PLAGOJ APARTENAS AL NI".



8-670


FILANTROPA SOCIETO
KIO ESTAS TIU SOCIETO?
ŜAJNE LA FILANTROPA, SED VIZITAS ĜIN NUR OFICIROJ.
NIA FILANTROPA SOCIETO HELPAS AL MIZERANTAJ OFICIROJ. TELERO DA SUPO, SKATOLETO DA CIGAREDOJ... DO, NE MALTRANKVILIĜU.
SINJOROJ OFICIROJ! TUJ VI RICEVOS MONON, ARMILOJN KAJ ESTOS SENDITAJ AL DON EN LA ARMEON, KIU SAVOS RUSION DE LA BOLŜEVIKOJ.




LA BOLŜEVIKOJ PENSU, KE TIO ESTAS "FILANTROPA SOCIETO".
SED FAKTE ĜI ESTAS EFEKTIVA REKRUTEJO, KVANKAM LA KAŜITA.
LA EKS-EKSPLUATISTOJ NE POVIS REZIGNACII PERDON DE LA POTENCO DE FINANCA SUPERECO, DE LA PRIVILEGIOJ. DE LA EKONOMIA SABOTADO LA MALAMIKOJ DE LA REVOLUCIO ĈIAM PLI AKTIVE TRANSIRIS AL SERIOZAJ AGOJ.
MURDOJ ELPOST ANGULO...
DIVERSIOJ...
...KONSPIROJ, RIBELOJ, KONTRAŬSOVETA PROPAGANDO ESTAS EN ILIA ARSENALO...


SAMTEMPE EN LA SUDO KAJ ORIENTO DE LA LANDO AKTIVE EFEKTIVIĜAS FORMADO DE GRANDAJ KONTRAŬREVOLUCIAJ ARMEOJ. LA MONARKISMA OFICIRARO, OFICISTARO, BURĜARO KAJ BIENULOJ, FUĜINTAJ EL LA CENTRO AL LA RANDOJ DE LA LANDO, UNUIĜAS KUN LA BURĜAJ NACIISTOJ.
NI ESTAS VERAJ ADEPTOJ DE LA LEĜA JURORDO.
NUR HAVU NENION KOMUNAN KUN ENTENTO.
MI ESPERAS, KE VI NE SEKVOS LA GERMANOJN?
CERTE, BONVOLU NE MÁLTRANKVILIĜI, SINJOROJ...
GERMANA KOALICIO
ENTENTO
LA MONDA IMPERIISMO, LAŬ LA VORTOJ DE V.I.LENIN, ELVOKIS LA CIVITANAN MILITON EN RUSIO.
SOLA BRITIO ELSPEZIS EN TIU PERIODO POR LA KONTRAŬSOVETA AGADO 89,7 MILIONOJN DE STERLINGAJ PUNDOJ.




KAJ SIMBOLO DE LA LEĜECO ESTAS BLANKA KOLORO KONTRAŬE AL LA RUĜA-KOLORO DE REVOLUCIOJ.
SED KIE NI PRENOS MONON, ARMILOJN?
DON, KUBANJ, SUDA URALO, SIBERIO IĜIS BAZAJ PUNKTOJ DE LA KONTRAŬREVOLUCIO. ĈIUJ ĈI FORTOJ KONSISTIGIS TIEL NOMATAN "BLANKAN MOVADON"
LA REVOLUCIO DEVIS SINDEFENDI. LA REVOLUCIO BEZONIS LA ARMEON.
ТЫ
ЗАПИСАЛСЯ ДОБРОВОЛЬЦЕМ?
NUR NIAJ PETROGRADAJ LABORISTOJ ALIĜIS 40-MILOPE
KAJ 60 MILOJ EL MOSKVO.
KAJ ANKORAŬ TVERJ, IVANOVO-VOZNESENSK, TULA, URAL...
KRESKAS LA RUĜA ARMEO!
LA TAGO DE LA 23-A DE FEBRUARO, KIAM LA LABORIST-KAMPULARA ARMEO AKIRIS LA UNUAJN VENKOJN APUD PETROGRADO, EKHAVIS LA TITOLON LA TAGO DE NASKIĜO DE LA RUĜA ARMEO.
DUM LA SOMERO KAJ AŬTUNO DE LA JARO 1918 PLI OL 800 MILOJ DA HOMOJ ALIĜAS AL LA RUĜA ARMEO.


LA 10-AN DE JULIO 1918
LA 5-A TUTRUSIA KONGRESO DE SOVETOJ LEGITIMIS FONDIĜON
DE LA RUĜA ARMEO.
KAMARADOJ BATALANTOJ! NI ANKORAŬ ESTAS MALBONE ARMITAJ KAJ EKIPITAJ. NI NE HAVAS LA BRITIAJN TANKOJN KAJ LA GERMANIAJN AEROPLANOJN. NI HAVAS PO UNU FUSILO POR SESOPO. SED NI FRAKASOS LA KONTRAŬREVOLUCION, ĈAR NI BATALAS POR NIA LABORIST-KAMPULARA POTENCO.
... EN VIAJ MANOJ ESTAS FUSILO – DEFENDILO DE ĈIUJ LABORULOJ, DE ĈIUJ SUBPREMITOJ... ...GARDU LA FUSILON EN SKOLTADO... ...GARDU LA FUSILON EN PATROLADO... –KIA VI ESTUS SOLDATO SEN FUSILO? ESTAS RIDINDE, KIAM TIA MALBRAVULO FORKURAS KAJ ŜPRUCAS TIMON AL LA ALIAJ. SED SE VI MALOFENSIVAS KUN ARMILO, DUM ESTAS ALMENAŬ UNU KARTOĈO, DEFENSIVANTE, EĈ MALOFENSIVANTE, VI SAVOS MILOJN DA HOMOJ DE VANA PEREO...
(EL LA FLUGFOLIO DE LA JARO 1918)
KAMARADO! GARDU LA FUSILON...





SOVETOJ KONCENTRIS ĈIUJN FORTOJN POR KREO DE LA ARMEO, ILI NUN NE HAVAS EBLECON OKUPIĜI PRI SIA SOCIALISMO.
NE ESTAS TIEL! EN LA 5-A KONGRESO DE SOVETOJ ESTAS KONFIRMITA LA UNUA SOVETA KONSTITUCIO, METINTA FUNDAMENTON DE LA SOCIALISMA DEMOKRATIO.
EN LA HALO DE KUNSIDOJ DE LA KONGRESO DE SOVETOJ.
MI VOĈDONAS POR LA LIBEROJ KAJ RAJTOJ, DONITAJ AL NI, LABORULOJ.
MI VOĈDONAS POR LA EGALRAJTECO DE ĈIUJ NACIECOJ.
MI VOĈDONAS POR LA SOCIALISMA ESTONTECO DE ĈIUJ NIAJ POPOLOJ.
LA DELEGITOJ DE LA KONGRESO UNUANIME VOĈDONIS POR KONFIRMO DE LA
UNUA SOVETA KONSTITUCIO.


LA SOVETA ŜTATO POVUS RELATIVE RAPIDE FRAKASI LA INTERNAN KONTRAŬREVOLUCION, SE NE MALHELPUS LA EKSTERLANDA MILITA INTERVENO.
NI ESTAS VIAJ ALIANCANOJ KAJ GARDOS LA RUSIAJN HAVENOJN POR KE NE INVADU LA GERMANOJ.
RIGARDU, ANKAŬ LA JAPANOJ, KAJ LA USONANOJ, KAJ LA BRITOJ. KION ILI BEZONAS ĈI TIE?
MI OPINIAS, KE ILI NUR SIN MASKAS SUB ALIANCANOJ.
ENTENTO KOMENCIS FAKTE INVADON EN SOVETAN RUSION.
LA 9-AN DE MARTO 1918 EN MURMANSK SURBORDIĜIS 200 BRITIAJ SOLDATOJ. BALDAŬ LA UNUA TAĈMENTO DE INVADINTOJ KOMPLETIĜIS PER GRANDAJ KONTINGENTOJ DE LA BRITIAJ KAJ USONAJ TRUPOJ. LA MEMBRARO DE LA TRUPOJ, SURBORDIĜINTAJ EN VLADIVOSTOK EKDE LA 5-A DE APRILO ĜIS LA 6-A DE JULIO, ESTIS 75 MILOJ DA JAPANOJ KAJ 12 MILOJ DA USONANOJ.




NUN EN VLADIVOSTOK ESTAS PRESKAŬ TIOM DA JAPANOJ, KIOM EN MIA PATROURBO.
KAJ IOM MALPLI DA USONANOJ OL EN LA MIA. DO, NI ESTU KIEL HEJME.
EN LA USONA FAMILIO.
NU, TURMENTIĜOS NIA ĜONNI EN TIU RUSIO. EN JULIO LI ESTIS KUN LA JAPANOJ EN VLADIVOSTOK, EN AŬGUSTO KUN LA BRITOJ EN ARĤANGELSK...
JES, KARA, TIU LANDO ESTAS IOM TRO GRANDA!


INTER LA 25-A KAJ 30-A DE MAJO 1918 LA RIBELINTA ĈEĤOSLOVAKIA KORPUSO OKUPACIIS PLURAJN URBOJN EN LA ORIENTA RUSIO.
TIO ESTIS 50 MILOJ DA MILITKAPTITAJ ĈEĤOJ KAJ SLOVAKOJ, FORMITAJ EN LA KORPUSON EN LA CARA RUSIO POR PARTOPRENO EN LA UNUA MONDMILITO. LA SOVETA REGISTARO INTENCIS EVAKUI ILIN EN LA PATROLANDON TRA VLADIVOSTOK, ĈAR LA VOJO AL LA OKCIDENTO ESTIS DETRANĈITA PERE DE LA FRONTOJ.
KAŜITA KUNVENO EN MOSKVO EN LA FRANCA MISIEJO.
50 MILOJ DA ARMITAJ SOLDATOJ EN LA MALFRONTO DE LA BOLŜEVIKOJ! NECESAS UZI ILIN DUM ILI NE TRANSIRIS AL LA FLANKO DE LA REVOLUCIO. FRAPU ILI LA BOLŜEVIKOJN DE LA ORIENTO!
LA ĈEĤAJ NACIISTOJ JAM RICEVIS MONON DE NI POR ORGANIZO DE LA RIBELO. KAJ NI AGNOSKOS ILIAN BURĜAN RESPUBLIKON.




SUR STRATO DE PRAGO.
MI RICEVIS LETERON DE LA FILO EL RUSIO. LI SKRIBAS, KE LI BATALAS KUN LA RUSOJ POR LA NOVA, SOVETA POTENCO.
SED LA MIA SKRIBAS, KE ONI ALVOKIS ILIN BATALI KONTRAŬ SOVETOJ. KIAL DO?
ĈU VI LEGIS "PRŮKOPNIK SVOBODY"? EVIDENTIĜIS, KE NIAJ BURĜOJ RICEVIS DE ENTENTO 15 MILIONOJN. POR TIU MONO ONI VENDIS DO NIAJN KNABOJN AL LA FRANCAJ KAJ BRITAJ IMPERIISTOJ.
MULTAJ ĈEĤOJ KAJ SLOVAKOJ KOMPRENIS ESENCON DE LA KONTRAŬSOVETAJ AGOJ DE LA NACIISTOJ. PLURAJ FORLASIS LA ĈEĤOSLOVAKIAN KORPUSON, ALIĜIS AL LA RUĜA ARMEO.
SKRIBU: NI KUNE KUN NIAJ RUSAJ FRATOJ DEFENDOS LA SOVETAN POTENCON KAJ NENIAM PERFIDOS ĜIN.
ONI PUBLIKIGOS NIAJN LETERON EN LA ĴURNALO, KAJ LA RUSOJ KOMPRENOS, KE ONI SUKCESIS TROMPI KAJ SUBAĈETI TUTE NE ĈIUJN EL NI.
LA LETERO DE LA ĈEĤOSLOVAKOJ, NE DEZIRINTAJ PARTOPRENI EN LA RIBELO, ESTIS PUBLIKIGITA EN LA ĴURNALO "URALSKIJ RABOĈIJ."



EN LA FAJRA RINGO
EN SOMERO DE 1918
3/4 DA TERITORIO DE SOVETA RUSIO TRAFIS EN LA MANOJN DE LA MALAMIKOJ. LA RESPUBLIKO ESTIS ĈIRKAŬITA PER FRONTA RINGO.
PETROGRADO
LA GERMANOJ, BANDOJ DE PETLURA.
MOSKVO
LA BRITIAJ TANKOJ, BLANKKOZAKOJ, TURKOJ.




BRITOJ, USONANOJ, BLANKGVARDIANOJ.
150 MILOJ DA INVADINTOJ
ESTIS EKZEKUTANTAJ LA REVOLUCION EN SIBERIO KAJ FORA ORIENTO.
JAPANOJ, USONANOJ, TRUPOJ DE KOLĈAK.
AL MEZO DE 1918
LA EKSTERLANDAJ KAJ INTERNAJ KONTRAŬSOVETAJ FORTOJ UNUIĜIS POR ARMITA BATALO KONTRAŬ SOVETA RUSIO.
LA BATALO KONTRAŬ LA MALAMIKOJ POSTULIS STREĈON DE ĈIUJ FORTOJ.


LA INVADINTOJ DE LA TERITORIO DE SOVETA RUSIO ESTABLIS LA REĜIMON
DE TERORO, PERFORTO KAJ ARBITRECO.
NUR EN LA ARĤANGELSKA REGIONO ĈIU KVINA CIVITANO ESTIS ĴETITA EN PRIZONON AŬ KONCENTREJON.
ĈI TIE VI POVAS SENTI VIN EN PLENA SEKURECO!




LA AMASAJ PAFEKZEKUTOJ DE CIVILA LOĜANTARO ĈE DON. TIEL UNU EL LA RESTINTAJ VIVE ATESTANTOJ RAKONTIS PRI ILI.
TIUJ RUSOJ MALAGNOSKAS AJNAN ORDON. MI JA KLARIGIS: 8 HOMOJ IRU AL PAFEKZEKUTO, 12 – ATENDU.


DUM LA CIVITANA MILITO EN FORA ORIENTO LA JAPANAJ INVADINTOJ FORBRULIGIS EN FAJRUJO DE LOKOMOTIVO LA 26-JARAĜAN ORGANIZANTON DE LA LOKA KAŜREZISTADO, BOLŜEVIKON SERGEJ LAZO KAJ DU LIAJN KAMARADOJN.
INFORMU PERE DE LA ĴURNALOJ, KE NI ABSOLUTE NE SCIAS, KIE NUN ESTAS TIU SERGEJ LAZO.
EFEKTIVE, KIEL NI POVAS SCII, KIEN TRAFAS LA ANIMOJ DE LA BOLŜEVIKOJ.


LA 30-A DE AŬGUSTO 1918, MOSKVO.
ĈU ONI MORTIGIS LENINON?
LA ATENCO KONTRAŬ LENIN ESTIS FARITA JE LA 7-A VESPERE EN LA KORTO DE LA UZINO DE MIĤELSON POST MITINGO. REZULTE DE LA ATENCO LI RICEVIS FORTAJN VUNDOJN, SED KURACISTOJ SUKCESIS SAVI LIAN VIVON.
LA KONTRAŬREVOLUCIULOJ NE NUR GVIDIS MALKAŜAN BATALON KONTRAŬ LA SOVETA POTENCO EN LA FRONTO, SED ANKAŬ ORGANIZIS TERORAJN AGOJN EN PROFUNDA MALFRONTO.
NI AKOMPANIS LENIN AL LA AŬTOMOBILO. EN TIU MOMENTO AŬDIĜIS TRI PAFOJ. DU KUGLOJ TRAFIS LENIN, LA TRIA — MIN.
POPOVA — PARTOPRENINTINO DE LA MITINGO.


KAJ JEN MI EKVIDIS JE TRI PAŜOJ DE LENIN VIRINON KUN REVOLVERO. MI KURIS AL ŜI, SED ŜI FORĴETIS LA REVOLVERON KAJ MALAPERIS EN LA HOMAMASO.
GIL — ŜOFORO DE LENIN.
NI KURATINGIS ŜIN KAJ REKONDUKIS AL LA UZINO. NUN ONI JUĜENKETIGAS ŜIN. NI NE DEVAS ALLASI LINĈADON.
BATULIN — PARTOPRENINTO DE LA MITINGO.
ILI AGIS KAŜE, ELPOST ANGULO.
KONTRAŬ LA VIVO DE LENIN ATENCIS LA TERORISTINO FAINA KAPLAN, 28-JARAĜA. ŜI DEKLARIS, KE ŜI PAFIS KONTRAŬ LIN PRO POLITIKAJ MOTIVOJ.
LA ATENCO DE KAPLAN NE ESTIS SOLA PROVO MORTIGI LENIN.
LA JUĜENKETISTO RAKONTAS.
SAMTAGE EN PETROGRADO LA FAMA SOVETA KAJ PARTIA AGANTO URICKIJ ESTIS MURDITA DE TERORISTO. PER TERORO LA MALAMIKOJ PENIS SENKAPIGI LA SOVETAN POTENCON.






9–670


NE EN PACAJ KONDIĈOJ, SED SUB PAFADO DE LA MALAMIKO, NE DUM MULTAJ JAROJ, SED EN TRE KONCIZA PERIODO ESTIS KREATA LA ARMEO DE LA UNUA EN LA MONDO SOCIALISMA ŜTATO.
MI DEZIRIS STUDI AGRONOMION.
KAJ MI REVAS IĜI INSTRUISTO.
MI NEPRE STUDOS POSTE POR IĜI KURACISTO!
SOVETOJ DECIDIS KRESKIGI PROPRAJN MILITESTROJN, JA LA MALNOVAJ MILITSPECIALISTOJ NE IROS AL ILI.
KAJ ILI EĈ TIMOS VARBI LA KADRAJN OFICIROJN AL SIA FLANKO!




ĈIUJ VIAJ REVOJ NEPRE REALIĜOS. SED NUN NI ĈIUJ DEVAS LERNI LA MILITARTON.
ESTIS BEZONATA BONE INSTRUITA ARMEO POR DEFENDI LA ESTONTECON, PRI KIU REVIS LA LABORISTOJ KAJ KAMPARANOJ. POR TIO ESTIS MALFERMATAJ MILITLERNEJOJ, KURSOJ, AKADEMIOJ.
LA SOVETA REGISTARO VARBIS EN LA ARMEON EKSAJN CARAJN-ARMEANOJN.
ĈIUJ EKSAJ OFICIROJ-SPECIALISTOJ ESTAS ALVOKATAJ SUB LA STANDARDOJN POR KREI MILITKAPABLAN RUĜAN ARMEON!
PER KIO LA OFICIRO POVAS AKIRI KONFIDON DE SOLDATOJ? PER HONESTECO, KOMPETENTECO EN SIA AFERO, AMO AL SOLDATO, ESTIMO DE LIA HOMA DIGNO.
MI ESTAS MILITSPECIALISTO LAŬ INKLINO, EKSTER LA ARMEO MI FARTAS MALBONE, MI AMAS MIAN PATROLANDON, SED ĈU ONI FIDOS AL NI?
JAM UNU JARON POST KREO DE LA RUĜA ARMEO ĈIRKAŬ 35 MILOJ DA KADRAJ OFICIROJ KAJ GENERALOJ, ANTAŬE SERVINTAJ EN LA CARA ARMEO, NUN ESTIS EN ĜI. PLURAJ EMINENTAJ SOVETIAJ MILITESTROJ ELIRIS EL TIUJ VICOJ.
EN MALFACILAJ KONDIĈOJ DE SOMERO KAJ AŬTUNO 1918 LA JUNA RUĜA ARMEO AKIRIS LA UNUAJN VENKOJN.



ESTIS TIA PERIODO, KIAM LA HIERAŬAJ LABORISTOJ, KAMPULOJ, SOLDATOJ IĜIS MILITESTROJ. NOMOJ DE MULTAJ EL ILI IĜIS LEGENDAJ.
RICEVU, KAMARADO, LA DONACON PRO LA BRAVECO EN LA BATALO.
KAMARADO KOMANDANTO, KIAL VIA VIZAĜO ESTAS TIOM KONATA? ĈU NI KUN VI FUĜIS DE LA CARA BAGNO EN 1915?
LA EMINENTA MILITESTRO, HEROO DE LA ENLANDA MILITO MIĤAIL FRUNZE NASKIĜIS EN LA FAMILIO DE MILITA HELPKURACISTO. PROFESIA REVOLUCIISTO. DUM LA ENLANDA MILITO LI KOMANDIS LA ARMEON, FRONTOJN.


DE TIE NIN PREMAS DU GENERALOJ, KAJ DE ĈI TIE — MEM ADMIRALO KOLĈAK.
HE, SE ILI SCIUS, KE LA SIMPLA SUBSIGNOJUNKRO BATALAS KONTRAŬ ILI.
KAJ KIEL JA BATALAS!
LA TALENTA MILITESTRO, HEROO DE LA ENLANDA MILITO VASILIJ ĈAPAJEV NASKIĜIS EN FAMILIO DE LA KAMPARANO-MALRIĈULO. LI PARTOPRENIS EN LA UNUA MONDMILITO. ESTIS DEKORITA PER TRI GEORGIJ-KRUCOJ (SUPERA SIGNO DE SOLDATA BRAVECO EN LA CARA RUSIO) PRO LA KURAĜO. DUM LA ENLANDA MILITO LA DIVIZIO, KIUN LI KOMANDIS, ATINGIS PLURAJN BRILAJN VENKOJN SUPER LA STURMAJ FORMACIOJ DE LA BLANKA ARMEO.




NE MALTRANKVILIĜU, KAMARADO KOMANDANTO. MI ATENDOS SANITARON.
TIO JA ESTAS MIA EFEKTIVA PROFESIO. MI BANDAĜOS PLI BONE OL AJNA SANITARO.
HEROO DE LA ENLANDA MILITO NIKOLAJ ŜĈORS NASKIĜIS EN FAMILIO DE LA FERVOJA MAŜINISTO. DUM LA UNUA MONDMILITO LI ESTIS MILITA HELPKURACISTO, SUBOFICIRO. PEREIS EN BATALOJ POR LA SOVETA POTENCO EN 1919. LI ESTIS TIAM 24-JARAĜA.


KIAL VI ESTAS EN LA RUĜA ARMEO, MI KOMPRENAS. LA REVOLUCIO NENION FORPRENIS DE VI... SED MI, INTERALIE, ESTAS NOBELO.
ANKAŬ MI ESTAS RUSA NOBELO. KAJ MI SERVAS AL MIA PATROLANDO.
LA SOVETIA MILITESTRO, HEROO DE LA ENLANDA MILITO MIĤAIL TUĤAĈEVSKIJ ESTAS NOBELO DEVENE. DUM LA UNUA MONDMILITO LI ESTIS OFICIRO DE LA CARA ARMEO. EKDE LA JARO 1918 — EN LA RUĜA ARMEO. TALENTA MILITESTRO. LI ELLABORIS NOVAJN PRINCIPOJN DE GVIDO DE MILITAGOJ. LI PEREIS KIEL VIKTIMO DE LA STALINAJ REPREZALIOJ EN 1937. LI ESTIS TIAM 44-JARAĜA.
ESTIS TIA PERIODO, KIAM LA PLEJ BONAJ FILOJ DE RUSIO, SENDEPENDE DE LA DEVENO, IRIS POST SIA POPOLO POR DEFENDI LA PATROLANDON.


TIOM DA IMPERIOJ ESTAS KONTRAŬ SOVETA RUSIO! ĈU NI ELTENOS?
NE FORGESU PRI TIO, KE TIU MILITO ESTAS KLASA. NI HAVAS MULTAJN AMIKOJN INTER LABORISTOJ DE LA TUTA MONDO.
SED KIEL ILI POVAS HELPI AL NI?
LA LONDONA HAVENO. LA DOKISTOJ STRIKAS.
KAMARADOJ! NI HELPU AL LA RUSAJ FRATOJ! NI DAŬRIGU LA STRIKON ĜIS ONI FORPRENOS ĈION ĈI DE ĈI TIE!
NENIA ARMILARO TRAFOS EN RUSION PERE DE NIA HAVENO.




USONO.
REVENIGU NIAJN JUNULOJN HEJMEN!
LA MANOJN FOR DE SOVETA RUSIO!
BRILA EKZEMPLO DE LA SOLIDARECO ESTIS KREO DE LA INTERNACIAJ TAĈMENTOJ, BATALINTAJ EN RUSIO KONTRAŬ LA INVADINTOJ KAJ BLANKGVARDIANOJ.
NUN VI ĈIUJ ESTAS BATALANTOJ DE LA RUĜA ARMEO. INTER VI ESTAS REPREZENTANTOJ DE DIVERSAJ LANDOJ. KAJ ĈU DUM BATALO VI KOMPRENOS KOMANDOJN EN LA FREMDA LINGVO?
NI KOMPRENOS, KAMARADO KOMANDANTO! NUN NI ĈIUJ HAVAS SOLAN LINGVON — LA LINGVON DE LA REVOLUCIO.


VENIS LA UNUA DATREVENO DE LA OKTOBRA REVOLUCIO.
EN PETROGRADO LA 7-AN DE NOVEMBRO 1918.
(LAŬ LA GREGORIA KALENDARO).
LA PRIVATULOJ FRENEZIĜIS! MI ĴUS FORDONIS LANUGAN KAPTUKON KONTRAŬ FUNTO DA NIGRA PANO! VIA EDZO ESTAS EN SOVETO, KIEN LI RIGARDAS?
SOVETOJ JAM ESTAS DETRANĈITAJ DE LA NUTRAJ, KRUDMATERIALAJ KAJ HEJTAĴAJ REGIONOJ.
NI VIDU, KIEL ILI ELVIVOS SEN LA UKRAINA GRENO KAJ VIANDO, SEN LA BAKUA NAFTO...
SEN LA DONECKA KARBO KAJ TURKESTANA KOTONO. 40 PROCENTOJ DA ENTERPRENOJ NE FUNKCIAS, SEKVE, LA DUA DATREVENO DE TIU ĈI POTENCO NE OKAZOS.




VIVU LA UNUA DATREVENO DE OKTOBRO!
MIA EDZO DIRAS, KE POST DU SEMAJNOJ ONI ABOLOS PRIVATAN MERKATON, KAJ DISTRIBUOS NUTRAĴOJN JUSTE INTER LA LABORANTOJ!
ĜUSTE! EN TIA PERIODO NE EBLAS ALIEL!
MI ĴUS REVENIS DE LA NORDA FRONTO. NI SUKCESIS HALTIGI AVANCON DE LA INVADINTOJ KAJ BLANKGVARDIANOJ.
SED EN SUDO NI DUME HAVAS PEZAN SITUACION. OFENSIVO AL DON ESTAS FIASKIGITA, KAJ EN LA NORDA KAŬKAZIO ESTAS FRAKASITA NIA 11-A ARMEO.
MALGRAŬ LA MALFACILA MILITA STATO, RUINIĜO, MALSATO, INTRIGOJ DE LA MALAMIKOJ, LA SOVETA POTENCO DAŬRE VIVIS KAJ BATALIS.


POST DU TAGOJ EN GERMANIO...
DIABLO PRENU! KIE MI ESTAS? ANTAŬ JARO MI FORKURIS DE ĈIO ĈI EL RUSIO, FORLASINTE MIAJN UZINOJN. KIEN RIGARDAS LA GERMANIA IMPERIESTRO?
ĈU VE NE SCIAS, KE HODIAŬ TAGMEZE NIA IMPERIESTRO ABDIKIS?
LA TUTAN POTENCON AL LA SOVETOJ!
VIVU LA SOCIALISMA RESPUBLIKO!
EN NOVEMBRO DE 1918 EN GERMANIO OKAZIS REVOLUCIO. LA MONARKIO FALIS. SED LA REAKCIULARO ESTIS FORTA, DO EN MAJO DE 1919 LA POPOLA RESPUBLIKO ESTIS DRONIGITA EN SANGO KAJ ESTABLIĜIS BURĜA RESPUBLIKO.


RUSIO.
LA LASTAJ NOVAĴOJ! REVOLUCIO EN HUNGARIO! BALDAŬAS LA MONDA REVOLUCIO!
LA 21-AN DE MARTO 1919 EN LA SITUACIO DE LA REVOLUCIA LEVIĜO, OKAZINTA EN LA TUTA HUNGARIO SUB INFLUO DE LA OKTOBRA REVOLUCIO, ESTIS PROKLAMITA HUNGARA KONSILANTARA RESPUBLIKO, KIU EKZISTIS ĜIS LA 1-A DE AŬGUSTO 1919.




FRANCIO.
EN LA ARBARO DE COMPIÈGNE (KOMPJENJ). EN LA SALON-VAGONO ESTAS DELEGITAROJ DE LANDOJ – REPREZENTANTOJ DE ENTENTO KAJ DE GERMANIO. ONI FARAS PACKONTRAKTON.
ANTAŬ LA REVOLUCIA DANĜERO NI DEVAS FORGESI, KE NI ESTIS MALAMIKOJ EN TIU MILITO. NI PROPONAS AL VI ARMISTICON. GERMANIO DEVAS FORIGI LA MILITTRUPOJN DE LA OKUPITA TERITORIO EN OKCIDENTO, ILI ESTAS PLI BEZONATAJ AL VI POR FARI ORDON EN LA PROPRA LANDO.
SED NENIUKAZE FORIGU LA TRUPOJN EL LA TERITORIO DE RUSIO.
LA 11-AN DE NOVEMBRO 1918 ESTIS SUBSKRIBITA ARMISTIC-KONTRAKTO INTER GERMANIO KAJ ENTENTO.
LA UNUA MONDMILITO FINIĜIS.
LA EVENTOJ DE AŬTUNO 1918 GRAVE ŜANĜIS LA INTERNACIAN SITUACION, KIO SENDUBE, INFLUIS LA STATON DE SOVETA RUSIO.







*FINE DE NOVEMBRO 1918 FONDIĜIS SOVETA RESPUBLIKO ESTONIO, EN DECEMBRO ESTIS PROKLAMITA LA SOVETA POTENCO EN LATVIO KAJ LITOVIO.*

*LA 1-AN DE JANUARO 1919 KREIĜIS PROVIZORA SOVETA REGISTARO DE BELORUSIO.*







**NOKTE DE LA 16-A DE NOVEMBRO 1918**
LA BRITIAJ KAJ FRANCIAJ MILITŜIPOJ ENIRIS LA NIGRAN MARON, CELINTE KURSON AL LA RUSIAJ BORDOJ. POST ILI TRA DARDANELOJ KAJ BOSPORO TRENIĜIS TRANSPORTOJ KUN MILITTRUPOJ, ARMILARO KAJ MUNICIO. TIEL ENTENTO "SUBSTITUIS" GERMANION, KIE OKAZIS LA REVOLUCIO, EN LA BATALO KONTRAŬ LA SOVETA POTENCO.


LA BRITOJ SURBORDIĜIS EN NOVOROSSIJSK.
ENTENTO VENKIS SUPER GERMANIO KAJ TIO MALBRIDIS ĜIAJN MANOJN POR MILITI KONTRAŬ LA SOVETOJ PER GRANDAJ FORTOJ
LA FRANCIAJ TRUPOJ OKUPACIIS ODESON KAJ SEBASTOPOLON.
KIA DIABLAĴO! MI NUR POR DEK MINUTOJ EKDORMETIS KAJ JAM TRAFIS MARSELON.
NE MALTRANKVILIĜU, SINJORO, NE VI ESTAS EN MARSELO, SED NI ESTAS EN ODESO.


LA RUĜA ARMEO NE HAVAS TIAJN TANKOJN. PROVU SUPERI TIAJN MONSTROJN.
NE, ILI RAMPAS SURTERE, KAJ ANKORAŬ PAFAS.
PAĈJO, KIEL NOMIĜAS TIUJ BESTOJ? FERAJ... ĈU ILI NAĜAS EN MARO?
INTER LA 22-A KAJ 27-A DE NOVEMBRO 1918...
ONI KONDUKAS BOLŜEVIKOJN! ĈU TIO ESTAS FIASKO?
NE, NI DAŬRE BATALOS KAŜREZISTE!
LA BRITIAJ KAJ FRANCIAJ SOLDATOJ ESTAS SAMAJ LABORISTOJ KAJ KAMPULOJ. ĈU ILI NE KOMPRENAS, KONTRAŬ KIU ILI BATALAS?..


EN LA TRUPOJ DE LA INVADINTOJ
EKBRULIS REVOLUCIAJ RIBELOJ.
EN ŜTONMINEJOJ ĈE ODESO.
KAMARADOJ, MI DEZIRAS KONATIGI VIN KUN NIAJ FRANCAJ AMIKOJ.
NI HELPOS ALPORTI LA VERON AL NIAJ MARISTOJ. NIA KOMUNA TASKO ESTAS ĈESIGI LA ARMITAN INVADON KONTRAŬ LA SOVETA RUSIO.
LA BOLŜEVIKA KAŜKOMITATO KREIS EN ODESO "EKSTERLANDAN KOLEGION" KIU GVIDIS AGITADON INTER LA FRANCAJ KAJ ALILANDAJ SOLDATOJ.
ODESO. EN LA FRANCA KONTRAŬSKOLTEJO.
VI ESTAS PAFEKZEKUTITA KUNE KUN LA RUSAJ BOLŜEVIKOJ. MI NE KOMPRENAS, KIEL VI, FRANCINO, ELEKTIS POR VI TIAN SORTON?
MULTAJ KOMUNISTOJ-KAŜREZISTANTOJ, ANKAŬ LA FRANCINO ĴANNA LABURB, ORGANIZANTO KAJ SEKRETARIO DE LA FRANCA KOMUNISTA GRUPO EN MOSKVO, UNU EL LA ORGANIZANTOJ DE "EKSTERLANDA KOLEGIO" EN ODESO, ESTIS KAPTITAJ DE LA INVADINTOJ, ELTURMENTITAJ KAJ PAFEKZEKUTITAJ.




MALGRAŬ LA PENOJ SUBPREMI LA KAŜMOVADON, ĜI NE ĈESIS. INTER LA MARISTOJ DE LA FRANCIA ESKADRO EKBRULIS RIBELO.
LA REVOLUCIA MOVADO TIEL TIMIGIS LA REGISTARON DE FRANCIO, KE ĜI DEVIS FORIGI SIAJN TRUPOJN EL RUSIO. KAJ BALDAŬ ESTIS EVAKUITAJ LA BRITIAJ TRUPOJ EL DISTRIKTOJ DE LA KASPIA MARO.
FRANCE
EN SUDO DE UKRAINIO KAJ EN KRIMEO ESTIS RESTARIGITA LA SOVETA POTENCO.



10–670


La novan 1919-an jaron
la Soveta registaro komencis per la novaj pacaj proponoj.
Kia do ĝi estas novaĵo? Ni proponis pacon al ili kaj en novembro, kaj en decembro, sed ili silentas kaj daŭrigas invadon!
Sed se estas iu ŝanco por ĉesigi la sangoverŝadon, necesas uzi ĝin.
La freŝaj novaĵoj! La Soveta Rusio proponas al Entento fari armisticon!
En Londono.
Trankviliĝu, sinjoroj! Ni ĵus proponis al la bolŝevikoj veni al la paca konferenco. Vi vidos: ili rifuzos la traktadon.
Ĉesigu la malgloran militon kontraŭ Soveta Rusio!
La registaroj de la imperiismaj landoj, penante trompi la internacian proletaron kaj montri sin kiel "pacfarantoj", proponis planon kunvenigi en februaro de 1919 sur Princ-insuloj konferencon de reprezentantoj same de la Soveta registaro, kiel de la kontraŭrevoluciaj grupoj, agantaj en Rusio.




Estas ruze elpensite! Proponi al Sovetoj pacon, kiam la Ruĝa Armeo sukcese ofensivas en ĉiuj frontoj!
Sovetoj ne eksidos al la kontrakto-tablo, kaj ĉiuj konvinkiĝos, ke ili estas kontraŭ la armistico.
Tamen la plano de la imperiistoj estis fiaskigita. La Soveta registaro konsentis sendi delegacion al Princ-insuloj.
La reprezentantoj de Entento interkonsiliĝas.
Kion fari, sinjoroj? La bolŝevikoj konsentis por la intertraktado, eĉ pli — konsentas pri iuj cedoj.
Nenian pacon! Nenian konferencon! Niaj kanonoj parolu kun Sovetoj!
Printempe de 1919
komenciĝis nova ofensivo de Entento kontraŭ la juna Soveta Ŝtato. Tiel respondis la monda imperiismo al la pacaj proponoj de la registaro de Rusio.


MI – AL NORDO! TIE LA BRITOJ KAJ USONANOJ OFENSIVAS.
SED MI – AL SUDO. BATALI KONTRAŬ DENIKIN!
PRINTEMPE DE 1919
ENTENTO UNUIGIS LA FORTOJN DE LA INTERNA KONTRAŬREVOLUCIO KAJ TIUJN DE LA INVADINTOJ. LA SOVETA LANDO BATALIS SAMTEMPE EN PLURAJ FRONTOJ.
GENERALO DENIKIN, ADMIRALO KOLĈAK, BRITIAJ GENERALOJ.
MI ESTAS OFENDITA, SINJOROJ BRITOJ. KIAL KOLĈAK ESTAS PROKLAMITA FAR VI SUPERA REGNESTRO DE RUSIO?
POR KIO DO KVERELI? NI UNUIĜU ĈE VOLGA – TIAM NI INTERKONSENTOS.
ENTENTO HELPIS AL KOLĈAK
KREI EN ORIENTO DE LA LANDO BONE ARMITAN 400-MILAN ARMEON. ĜI PREZENTIS GRANDAN MINACON KONTRAŬ LA SOVETA ŜTATO.




KAJ MI – EN ORIENTON. LIBERIGI URALON DE KOLĈAK!
KAJ MI – EN OKCIDENTON. AL ĈEBALTIO MINACAS LA GERMANOJ, KAJ LA BLANKGVARDIANOJ, KAJ LA BRITOJ!
EN MAJO 1919,
KIAM LA TRUPOJ DE KOLĈAK FUĜIS PRO LA FRAPOJ DE LA RUĜA ARMEO EN ORIENTO, KOMENCIĜIS OFENSIVO DE LA TRUPOJ DE GENERALO JUDENIĈ AL PETROGRADO. ĜI ESTIS HALTIGITA FAR LA RUĜA ARMEO, KAJ LA MALAMIKO ESTIS REBATITA DE PETROGRADO.
SOMERE DE 1919
EN MALFRONTO DE KOLĈAK LEVIĜIS FORTO – KAMPULARA PARTIZANA MOVADO EN SIBERIO KAJ FORA ORIENTO.
LA RUĜA ARMEO FORTE BATIS KOLĈAK EN URALO! KAJ NUN ĜI PELAS LIN AL ORIENTO.
DO NI RENKONTOS LIN ĈI TIE.
PERE DE UNUIGITAJ PENOJ DE LA RUĜA ARMEO KAJ PARTIZANOJ
LA ARMEO DE KOLĈAK ESTIS FRAKASITA.
LA DECIDAJ VENKOJ SUPER LA INVADINTOJ ESTIS ATINGITAJ EN NORDO DE LA LANDO.


ILI KARTLUDAS JE RUSIO.
NE REZULTIS EN ORIENTO — NI IRU AL SUDO!
KOLĈAK ESTAS FRAKASITA. NUN NIA ĈEFA ATUTO ESTAS DENIKIN!
PETROGRADO
DENIKIN
MOSKVO
SOMERE DE 1919, VASTE UZANTE MILITAN HELPON DE ENTENTO KAJ USONO, LA ARMEO DE DENIKIN EKOFENSIVIS LAŬ LA TUTA SUDA FRONTO. DUM DENIKIN OFENSIVIS AL MOSKVO, DE OKCIDENTO AL SOVETA RUSIO PROKSIMIĜIS 100-MILA MILITTRUPO DE LA BURĜA POLLANDO. JUDENIĈ DENOVE OFENSIVIS AL PETROGRADO.
EN LA MILITA UZINO DE BRITIO.
LA SOVETIAJ SINDIKATOJ TURNIS SIN AL NI KUN PETO HELPI ĈESIGI LA INVADON. NIA ARMILO ESTAS STRIKO! LA TANKOJ NE TRAFOS EN RUSION!


LA 3-AN DE JULIO 1919
DO, TIEL! MI OPINIAS, SINJOROJ, KE JAM POST SEMAJNO NI ESTOS EN MOSKVO! MI JAM AŬDAS LA SONORILADON.
TIEL LI KOMENCIS.
DO, TIEL! MI OPINIAS, KE JAM POST SEMAJNO NI ESTOS EKSTERLANDE, EN KONSTANTINOPOLO. KAJ NENIAJN SONORILOJN! KAJ SONORON!
LA 4-AN DE APRILO 1920
TIEL LI FINIS.
EFEKTIVE POPOLA MILITO KONTRAŬ LA EKSTERLANDAJ INVADINTOJ KAJ KONTRAŬREVOLUCIULOJ DISVOLVIĜIS EN LA FRONTO KAJ EN LA OKUPACIITA MALFRONTO. GRANDAN HELPON AL LA RUĜA ARMEO FARIS KAŜREZISTAJ ORGANIZOJ KAJ PARTIZANAJ TAĈMENTOJ.
LA LABORISTA KLASO DE BRITIO, FRANCIO, NORVEGIO KAJ DE ALIAJ LANDOJ VERVE REEĤIS AL LA ALVOKO DE LA RUSAJ FRATOJ LAŬ LA KLASO ĈESIGI LA INVADON.
LA REGISTAROJ DE LA ENTENTO-LANDOJ ESTIS DEVIGITAJ KOMENCE DE 1920 FORKONDUKI SIAJN TRUPOJN EL LA SOVETA LANDO.

Tamen la imperiistoj ankoraŭ esperis frakasi Sovetan Rusion kun helpo de la milita forto.

**En aprilo de 1920...**




Laŭ la metafora esprimo de Lenin, la burĝa-bienula Pollando kaj la barono Vrangel estis du manoj de la monda imperiismo.

La pola armeo invadis la teritorion de Soveta Ukrainio, okupaciis Kievon.




La Centra Komitato de la partio de bolŝevikoj proklamis en tiuj tagoj:
"Frakaso de la atakintaj nin polaj blankgvardianoj neniel ŝanĝos nian rilaton al la sendependeco de Pollando."






Transirinte nokte, dum la malfluso, Sivaŝ, la Ruĝa Armeo venis en malfronton de la malamiko. La nealireblaj fortikaĵoj de la malamiko estis venkitaj, la armeo de barono Vrangel estis frakasita.

La venko super Vrangel kaj la burĝa Pollando signifis plenan fiaskon de la penoj de Entento likvidi la sovetan potencon en Rusio.

**Al la jaro 1921 la enlanda milito finiĝis.**


LA IMPERIISTOJ HAVIS MONON, ARMILARON, ARMEOJN, TAMEN ILI NE SUKCESIS VENKI.
HELPIS NEK TANKOJ, NEK AVIADILOJ. VERA MIRAKLO!
ĈU VI SCIAS, KIEL LENIN SKRIBIS PRI TIU MIRAKLO: "ONI NENIAM VENKOS TIUN POPOLON, EN KIU LABORISTOJ KAJ KAMPARANOJ EKVIDIS, KE ILI DEFENDAS LA POTENCON DE LABORULOJ, TIUN AFERON, KIES VENKO DONOS AL ILI KAJ AL ILIAJ INFANOJ EBLON UZI ĈIUJN BONOJN DE LA KULTURO, ĈIUJN KREAĴOJN DE LA HOMA LABORO".
ONI DIRAS, KE EN URBOJ LA POPOLO ŜVELAS PRO MALSATO-MANKAS PANO!
SED KIE PRENI ĜIN? NE ESTAS PER KIO SEMI, MANKAS ĈEVALOJ, KAJ VI ESTAS SOLA VIRO POR LA TUTA VILAĜO...
MILIONOJN DA VIROJ MINUSIS LA RUSAJ VILAĜOJ AL FINO DE LA ENLANDA MILITO.




AMPLEKSO DE PRODUKTARO DE LA GRANDA INDUSTRIO EN 1920 FALIS ĜIS 13,8% KOMPARE KUN LA NIVELO DE 1913. DUM LA MILITO RUSIO PERDIS 1/3 DE LA TUTA ANTAŬMILITA ORA REZERVO.
DUM NI NE DONOS AL LA VILAĜOJ VAROJN, TEKNIKAĴOJN, ILI NE POVOS DONI AL NI PANON.
ESTAS MALFACILE KOMENCI DE NULO, SED NECESAS KOMENCI.
LA SOCIALISMA KONSTRUADO KOMENCIĜIS EN LA LANDO EN TRE MALFACILAJ KONDIĈOJ, KIAM EN FORA ORIENTO ANKORAŬ DAŬRIS BATALO KONTRAŬ LA JAPANAJ OKUPANTOJ, KAJ EN MEZAZIO KAJ TRANSKAŬKAZIO OFTE EKBRULIS RIBELOJ DE LA RESTINTAJ BLANKGVARDIANOJ KAJ LOKAJ NACIISTOJ, KIAM SEP JAROJ DE LA IMPERIISMA KAJ ENLANDA MILITOJ REZULTIGIS MASTRUMAN RUINIĜON EN GIGANTAJ SKALOJ.


KIAJ DO NI ESTAS STUDENTOJ? LASU NIN, PROFESORO, NECESAS NOVAN VIVON KONSTRUI, KIA DO POVAS ESTI STUDADO?
EN LABORISTA FAKULTATO.
ONI SENDIS VIN AL LA LABORISTA FAKULTATO POR KE VI LERNU KONSTRUI TIUN NOVAN VIVON. DO, VI DEVOS TROVI TEMPON ANKAŬ POR LA STUDADO!
JAM EN LA JARO 1921 EN LA LANDO ESTIS 244 SUPERAJ LERNEJOJ KOMPARE KUN 91 EN 1915, ESTIS MALFERMITAJ 13 MILOJ DA NOVAJ LERNEJOJ, INSTRUADO EN ĈIUJ LERNEJOJ EFEKTIVIĜIS EN GEPATRAJ LINGVOJ KAJ SENPAGE.




LA 6-AN DE OKTOBRO 1920
LA FAMA ANGLA VERKISTO-FANTASTULO GERBERT WELLS RENKONTIĜIS EN MOSKVO KUN LENIN.
ĈU ELEKTRIZADO DE RUINIGITA RUSIO?! DO VI ESTAS ANKORAŬ PLI GRANDA FANTAZIULO OL MI, SINJORO!
PLANO DE ELEKTRIZADO DE RUSIO (GOELRO)
BONVOLU VENI AL NI POST KELKAJ JAROJ.
LA GRANDIOZAJ PLANOJ DE LA SOCIALISMA KONSTRUADO AL MULTAJ ŜAJNIS TIAM NEEFEKTIVIGEBLAJ. LA TEMPO KONVINKIS ILIN PRI TIO, KE LA LANDO, EFEKTIVIGINTA LA GRANDAN REVOLUCION, KAPABLAS ANKAŬ POR LA GRANDAJ EFEKTIVIGOJ EN EKONOMIO KAJ KULTURA VIVO.


NI ADIAŬAS AL VI EN MOSKVO EN LA JARO 1922, EN TIU JARO, KIAM...
...ESTIS LIKVIDITAJ LA LASTAJ FAJRUJOJ DE LA ENLANDA MILITO. LA REVOLUCIO DEFENDIS SIN...
HO, KIA VIVO KOMENCIĜAS! SE EBLUS NUN RIGARDI EN LA JARON, EKZEMPLE, 198... KIAJ ILI ESTOS – LA HOMOJ DE LA SOCIALISMA ESTONTECO?!
JEN ILI ESTAS – NIAJ INFANOJ – ILI JA ESTAS LA HOMOJ DE TIU ESTONTECO!
KAJ HODIAŬ ESTAS ANKAŬ FESTO-NASKIĜTAGO.
LA NASKIĜTAGO DE NIA ŜTATO.
HURA! MORGAŬ ESTOS NOVJARA FESTO!




...EN LA KONFERENCO DE 34 LANDOJ EN ĜENOVO LA SOVETIA DELEGITARO PROPONIS LA PROGRAMON DE TOTALA MALARMADO KAJ PLIFIRMIGO DE LA PACO INTER LA POPOLOJ. SOVETA RUSIO FARIS LA UNUAJN PAŜOJN SUR LA INTERNACIA ARENO...
...EN MOSKVO LA PLENRAJTIGITAJ DELEGITAROJ DE LA SOVETAJ SOCIALISMAJ RESPUBLIKOJ SUBSKRIBIS LA KONTRAKTON PRI FONDO DE LA UNUIĜITA ŜTATO – USSR.
KREO DE TIU ŜTATO KRONIS LA AFERON DE LA RUSIA REVOLUCIO DE LA JARO 1917.
PAĈJO, KIAM MI KRESKOS, ĈU MI POVAS LERNI JE PILOTO?
VI EĈ FLUGOS AL LA STELOJ, FILETO.

РУССКАЯ РЕВОЛЮЦИЯ 1917 ГОДА:
КАК ЭТО БЫЛО?

*На языке эсперанто*

Технический редактор *Г. В. Лазарева*

Фотоофсет. Подписано в печать 17.07.89.
Формат 60x84 1/16. Бумага офсетная № 1.
Печать офсетная. Условн. печ. л. 9,3.
Уч.-изд. л. 12,51. Тираж 5300 экз. Заказ № 670.
Цена 1 р. 30 к. Изд. № 46224.

Ордена Трудового Красного Знамени
издательство "Прогресс" Государственного
комитета СССР по печати.
119847, ГСП, Москва, Г-21, Зубовский
бульвар, 17

Отпечатано на Можайском полиграфкомбинате
В/О "Совэкспорткнига" Государственного
комитета СССР по делам издательств,
полиграфии и книжной торговли.
143200, Можайск, ул. Мира, 93.

**KIAM EN OKTOBRO DE 1917 SOVETOJ, GVIDATAJ DE LA BOLŜEVIKOJ IĜIS REGISTARO, "EKSPERTOJ" PRI RUSIO PROKLAMIS: "ILI ELTENOS EN LA PLEJ BONA OKAZO MONATON AŬ DU". SED TIUJ EL NI, KIUJ KONIS LA SOVETAN POPOLON, ASERTIS, KE LA REVOLUCIO SOLIDARIGOS LA AMASOJN ĈIRKAŬ SIA REGISTARO... LA VIVO PRUVIS NIAN PRAVECON**

**ALBERT RHYS WILLIAMS,** USONA VERKISTO KAJ PUBLICISTO

ELDONEJO "PROGRESO" ISBN 5-01-002340-7

1 p. 30 к.